Li estis maldormanta kaj sonĝis, kaj li sonĝis kun klareco kompleta. Li pensadis, kaj li pensadis sen ia malhelpo, sen vibradoj, eĉ sen pulsa ĝeno. "Mi ja ne volis morfinon—diktis al li la penso—Pro tio ke mi ĝin tiom deziradis, mi ĝin ne voladis; sed la neŭralgio, la senenergia kuracisto, mi senenergia, inter la turmento hodiaŭa kaj la turmentego morgaŭa, mi prokrastis al mi la turmentegon! Mi estas perdiĝinta, mi ja ĝin scias, sed mi dormu, ĉar la morto ja venos ĝiahore."

Li volis dormi, sed neeble: ne estis dormemo por dormi, tia dormemo: tio estis la neniiĝo de la materio, lasante la spiriton je duonlumo, sed je ia lumo travidebla; tio estis, kio estas la dormo de la fakiroj, la ekstazo mistera de la morto, la heleco fluganta, lumigante la penson, ne tuŝante la karnon nek la ostojn. "Mi timis tiun morfinon—diradis al li la lumo—mi ĝin timis kiel la viro malforta timas la virinon kiu lin enamigas kaj lin elĉerpas; kiel la floroj sendube timas printempon kiu ilin malfermigas kaj ilin sekigas; kiel la papilio la parfumon, kiu donas al ĝi vivon kaj ĝin mortigas. Ĉiam mankis al mi energio, kaj tiu mistera eliksiro, kiu devas ĝin doni al mi, portante ĝin al mi estas mortigonta ĝin. Mi estas tridek-jara. Kion mi faris? Flari la verkojn de la grandaj majstroj, ebriiĝi en ĉiaj literaturoj, gustumi ĉiujn fontojn de la plej pura arto kaj gustumi ĉiujn venenojn. Mi eniris ĉiujn novajn templojn, mi adoris ĉiujn ruinajojn, mi atentis ĉiujn religiojn, kaj ne faris nur tion, kion mi devis fari: produkti, paroli, krei, kio estas la sola afero bona, kiu restas sur la tero. Mi ne povis: mankis al mi antaŭenpuŝo; mi vidis la verkon kiel la frukton sur la arbo kaj mankis al mi entuziasmo por grimpi al ĝi; mi vidis la sunon kaj ĝi brilvundis min; mi revis kaj mi ne povis ĉirkaŭpreni la revon..."

Kaj pensante, pensante, kiel tiu, kiu vidas preterpasantan vizion, ŝvitguto ruliĝadis sur lia vizaĝo malsupren, kaj li sentis ĝian malvarmecon kaj ne havis forton por ĝin forigi.

"Sed, ci ĝin donos al mi, morfino, la forton! Tute negrave, ke ci min mortigos poste. Hodiaŭ mem ni laborados! Mi metos en tio la penson kaj ci subtenos la manon, se ĝi volos fali, ĉar ci havas la kuraĝon, kiu al mi mankas. Kaj kian verkon ni faros, morfino! Kian filon havos ni ambaŭ! Kian belajon! Ĝi estos la verko de tridekjara atendado, de dezirado cin havi kaj neebleco cin posedi! Mi rakontos ĝin al ci linion post linio kaj ci movos la volon kaj ĉiu kiso cia estos strofo, kaj tute negrave ke ci min venenos: se la frukto estos bela, venenu min! Mortigu la floron, ĉar por tio estas la floroj: por odori kaj por senfoliiĝi. Jes: por senfoliiĝi" li diradis. Kaj la revo fariĝadis pli dolĉa, kaj, fine, ne plu estis revo tio, kion li havis: ĝi estis la ĉirkaŭpreno al la idealo, la elĉerpiĝo sen doloro, la regado de la netuŝeblo.

En tiu stato li jam povis direkti la revon: li regis ĝin, li kondukis ĝin, li gvidis ĝin. Se ĝi prezentiĝis en malgaja vesto, li malfermetis la okulojn kaj forkuris: se ĝi estis bela, li retenadis ĝin kun si kaj ame luladis ĝin kaj devigis ĝin disvolvadi ĉiujn iluziojn, kiujn li volis. Dum momento li estis mastro de tio, kio foriras, de tio, kio glitas, de tio nebula, de tio nepalpebla; kaj ĉirkaŭprenante kion oni ne povas teni, li dormiĝis... pro dormado, ĝis la morgaŭa tagiĝo, ĝis la reala heleco lin revenigis al nia vivo.

Li rektigis sin sur la lito kaj la kapturniĝo klinigis al li la kapon; li viŝis al si la ŝviton, li sidiĝis kaj rigardante sur la tableton li ektremis. Ŝi! La tentulino! La malvirtulino! La ame malvirta estis tie! Tie apud li! Tute proksime, gardobservante lin! Kion li faros? Ĉu li lasos ŝin? Ĉu li estos volpova lasi ŝin? Mi redonos—li diris al si mem—redonos ĝin al la doktoro. Ĝi ne estas mia. Mi ĝin abomenas, li aldonis prenante ĝin.—Kaj ŝvitante, malvarma, li alprokŝimiĝis ĝin al si iom post iom, kaj subite, dum la sango alfluis al la okuloj, li resaltigis ĝin sur la plankon, ĵetante ĝin kun la sama bedaŭro kun kiu oni ĵetas la velkintajn florojn, kiujn oni trovas en libro, de virino falsa kaj malbenita.

"Ne! Mi volas esti sola! Sola mi laboros, sola mi iros, kien mi devos iri! Ci ne regos min! Mi juras tion al ci! Mi ne lasos min regi! Mi zorgos mian volon, kaj ĝi estos mia helpanto, ĉar ĉiam estis la volo, komprenu ĝin, kiu faris la fortajn verkojn! Mi foriras — li diradis al si. — Jes... Mi foriras... — Kaj li ne moviĝis. — Mi ne povas resti en tiu medio de malsano. Mi ne povas..." Kaj li ne moviĝis; li ne povis moviĝi. Estis al li neeble moviĝi! Ŝajnis ja, ke mistera magneto tenas lin tie alnajlita; ke ia tento nekonata lin haltigas; ke la infero estas trovinta novan povon por detrui la intencojn de la homo. Ok fojojn li iris de la pordo al la tablo, de la tablo al la balkono, de la balkono al la pordo, nekuraĝante krii helpon pro timo ke oni helpos lin; nekuraĝante rigardi sur la plankon, sur tiun tapiŝangulon, kie estas kaŝita la vipuro, timante ĝin, volante ĝin, tremante, serĉante kion li ne perdis; ĝis fine li ĵetis sin sur la liton, kaj, de la lito, pli ol iam la rigardo fiksiĝis sur tiun vitran pecon, kiu briladis tie kuntiriĝinta, per koloroj de venena floro, per reflektoj de salamandro, per ĉielarkkoloroj kaj briloj de koleoptero; kaj stariĝante, per unu salto kaptis la serpenton de sur la planko kaj forkuris rigardante posten kvazaŭ li estus ŝtelinta ĝin...

La morgaŭon li skribadis kaj skribadis sola, sen morfino, propravole. Duhora skribado senpripensa, plenigante pli kaj pli da manuskriptaj folioj, ne polurante ilin, ne stiligante ilin, plumflue, kvazaŭ li ne volus scii kion li skribas, kaj antaŭenirante tra la blankeco de la papero, kvazaŭ ĝi estus glacia dezerto kies transiron li estus decidinta, trairante la dezertlokojn kaj rigardante nur transen. Ŝajnis, ke li ne povas halti, ke li ne volas rigardi la horloĝon, ke li atendas kaj timas proksimiĝantan horon, ke li deziras ĝin, timante ĝin; dum la hormontrilo ĉirkaŭiras, ŝajnis, ke la deziro ĉirkaŭiras kun la montrilo; li estus volinta ĝin haltigi kaj li estus volinta ĝin rapidigi; li volus, ke ĝi mem haltu; ke la tempo estus la haltinto; kaj ĉar la tempo ne haltas, li volis senpripensigi sin skribante, skribante tiel rapide kiel li povis. Venis momento, dum kiu la plumo skribadis sola, kvazaŭ spirito ĝin gvidus, la spirito de la volo, la animo amika, batalante kontraŭ la animo de la horloĝo; sed tiu ĉi daŭris nekortuŝebla kaj la korpo malfortiĝadis. Ju pli li vojiradis, des malpli lin sekvis la mano; kaj kiam li transiris tiun horon tiel deziratan kiel timatan, la tempo ekpaŝis pli

rapide ol iam kaj la mano falis elĉerpita.

Malespera, ekscita, malkvieta, "ne povas esti —li diris. — Neeble!" Kaj li eltiris la ameman vespon kaj donis al si la pikon.

Vivflamo ekfluis tra la vejnoj, supreniranta, supreniranta ĝis la tempioj, kaj rava bano de kvieteco lasis lin serena, kvieta, certa pri si mem, kvazaŭ la ĉielarko estus lokiĝinta sur la tempioj. Li legis kion li skribis, kaj unu post alia, farante la kritikon pri sia verko, li disŝiradis la manuskriptojn. Li, la homo rafinita, la verkisto bongusta, kiu kunigadis en unu paĝo la mistikecon de Verlaine kun la vibreco de Mallarmé kaj la forto de Baudelaire, estis verkinta tridek foliojn de prozo felietona, vulgara, eĉ malinda. Sed nun kun la amantino malbonkora, kun la sireno malvirta, kun la dolĉa amatino, trompema, li skribos unu paĝon, unu solan, sed skribos ĝin ili ambaŭ, rigardante unu la alian en la okulojn, kisante sin, venenante sin, malvirtigante unu la alian. Kaj gvidata de la sireno li verkis paĝon senpekan, brilan kaj serenan, sed ĝi kostis al li dek jarojn de vivo.

Post la reviglĝo venis denove la enreviĝo, kaj, kuŝante sur la lito, kiel ĉiam, li turnis folion en la libro de siaj revoj kaj daŭrigis la legadon: "Mi jam ne forlasos cin, morfino: mi jam estas tute cia; ci jam havas min cia; jam, se eĉ mi volus, mi ne povus. Mi ja scias, ke ci estas mortigonta min, ke ci mortigos min iom post iom; sed, kaj la konsoloj, kiujn ci donos al mi, kiujn mi ne pagus mortante cent fojojn, mil fojojn en ciaj brakoj, se mil fojojn ci povus mortigi min? Ci suferigos min multe, mi ja tion scias, sed mi mortos kisante cin, adorante cin, amegante cin. Kaj ju pli ci doloriĝos min, des malpli mi povos vivi sen ci; ju pli proksimen al la morto ci min portos, des pli mi volos cin apud mi; ju pli ci lasos min sen vivo, des pli da vivo mi venos al ci peti, ĉar ci havos la mian kaj restos kun ĝi kiam ci volos" diris la paĝo, kiun li legis. Kaj tiun fojon li fermis la libron, sen batalo, fordonita, venkita, ne volante fari plian klopodon por liberigi sin de la ĉarma vipuro, nur petante al ĝi unu aferon: ke ĝi helpu lin fini la verkon.

De unu piko li iris al dua; de dua al tria, al kvara, al nekalkulo, al libereco piki lin kiam ĝi volos. Kiel li antaŭvidis, ju pli da veneno des pli da konsolo, kaj por pli da konsolo, pli da veneno. Ju pli li fordonis sin al ĝi, des pli bezonis ĝin; ju pli ĝi sufokadis lin, des pli li voladis esti sufokita; ju pli li trinkis, des pli da soifo; ĝi estis la morto, kiu finigadis lin vivigante lin.

Venis momento, en kiu ŝi estis laca de li; en kiu li jam estis ŝia; en kiu la kisoj, kiujn ŝi donis al li, estis malvarmaj; kaj en kiu li volis pli da veneno kaj ŝi deflankigis la lipojn. La verko estis nur duonfarita kaj la morto multe pli ol en la vojmezo. Malgrasa kaj kun koloro de bakita tero, kun la okuloj vitrecaj kaj kavaj, li nur atendis la momenton ŝin posedi por denove atendi alian momenton; kaj ĉiam alian, sen ripozo kaj sen moderigo, kun la eterna avidego neniam kvietigi siajn dezirojn. Li havis jam la korpon duonmortinta kaj nur vibradis en li la spirito, eklumiĝante kaj estingiĝante kun korpremoj neniam kontentigitaj. De unu paĝo, kiun li skribadis ĉiutage, li transiris al skribado de unu sola strofo, kaj de unu strofo al unu linio. Jam la terura kunulino nur gvidadis lin momenton, momenton por karesi al li la harojn kaj tempiojn, kaj por forkuri kiam li plej multe ŝin deziris.

Li atingis la staton senti sin freneza, vidi sin enprofundiĝanta, vidi ke la racio lin forlasas kaj ne havis konscion ĝin voki, kaj perdante la forton ... de la forto; li venis al stato lasi sin konduki de la kuracistoj kaj de la amikoj al la supera klopodo por sin savi: lasi sin enfermi en sian ĉambron, sola, sen ŝi, sen tio, ke ŝi eniru se li eĉ mortus vokante ŝin.

Kio okazis al li post la enfermiĝo, oni devus skribi per nigra galo kaj ne per inko. Ĉiuj turmentoj de la mezepoko, ĉiuj doloroj, kiujn elsendas la infero por elprovi la esperantojn; ĉiuj maltrankvilecoj de agonio, kiu, estante agonio, neniam finiĝas, estus palaj por tion klarigi. Ŝajnis al li, ke oni jetas lin en la maran mezon, kaj ke li ne scias naĝi; ke li devas malsupreniri en fosaĵon de grandega kaj glitiga turo, sin subtenante per la ungoj; ke oni pendigis lin super granda abismo, kaj ke li devas teni la ŝnuron per la buŝo, se li ne volas enabismiĝi. Unue la ŝvito; de la ŝvito al la febro: ia malvarma febro, kiu pulsigis la tempiojn lin frostigante; de la febro al la soifo: ia soifo, kiu revigis lin pri lagoj de putriĝanta akvo por trinki ĉe ĝi; poste la hepato ŝvelante kaj resaltante kvazaŭ ĝi volus liberiĝi el la korpo; kaj laste, la tremetado, tremetado de la haroj, okuloj, fingroj, dentoj; tremetado taga kaj nokta; tremetado pri kiu li sciis, ke ĝi daŭros monatojn senhalte, kaj ĉiuhore, kaj ĉiam! "Venu — li kriadis al la morfino — Venu mortigi min! Se ci estis kruela, estu kompatema! Mortigu min! Mi petegas cin! Mi pli preferas morti kun ci ol vivi! Malfermu al mi, pro Dio, ke mi ne volas resaniĝi! Malfermu al mi! Malfermu al mi!" Kaj kriegante kiel kondamnito, li volis sin ĵetegi kontraŭ la murojn, kaj kriadis, kaj petadis helpon kaj oni ne volis lin aŭskulti, kaj li kriadis, kaj la muroj estis kvazaŭ surdaj; kaj li deŝiradis la murpaperon per la ungoj kaj la ungoj fleksiĝadis al li; kaj li rondiradis kiel leono ..... seiante, ĉiela Dio, ke per unu piko, per unu sola piko de la malbenita virgulino, li trovus konsolon kaj kvieton; kaj nek li povis posedi ŝin, infera fulmo, nek mortigi sin.

Dum momento, kvazaŭ falus al li radio de espero, kolektante ĉiujn fortojn, li stariĝis, alkuris la libroŝrankon, elprenis libron, malfermis ĝin, kaj tremante kiel hidrargo, tie en angulo, li trovis pakaĵon da morfino. Neniam la suno, falante sur ruinojn, portis tiom da ora lumo, kiom falis al li sur la vizaĝon! neniam la ĉielo havis tiom da heleco. Ĝin tutan li englutis, ĝis la lasta peceto, ĝis la lasta ero: kaj, kiam revenis al li la forto, kun la tuta puŝo de fulmo kaj la tuta energio de frenezulo, per unu frapo de malesperanto, li renversis la pordon kaj forkuris de tiu malliberejo.

Li forkuris, sed li devis reveni baldaŭ al ĝi, devis reveni al ĝi... por morti.

Plena de ŝveloj, plena de vundoj, kaj ne trovante jam en sia korpo tra kie enigi al si la morton, tra la samaj vundoj li ĝin enigis en sin.

Li dormis jam, mortante de dormado; li jam ne

havis volon krom por ne havi ĝin; kaj, dum li estis neniiĝanta malrapide, iom post iom, la verko, lia verko, servis tie sur la tablo por envolvi morfinon.

Trad. S. Alberich-Jofre.

RAKONTO PRI KIŜ.

JACK LONDON.

EL "LITERATURA MONDO"

Kiŝ vivadis antaŭ longe apud la bordo de l' polusa maro. Li estis ĉefulo en sia vilaĝo, kaj mortinte, li estis honorata, kaj lia nomo restis sur la lipoj de la homoj. Li vivis en tiel malproksima tempo, ke nur la maljunuloj memoris lian nomon kaj la rakonton, kiujn la prapatroj postlasis al ili. Ankaŭ la venontaj maljunuloj, siavice, same faros al siaj idoj ĝis la tempfino. Kaj estis dum la vintra mallumo, kiam la nordvento blovegas tra la glacieben aĵo kaj la aero pleniĝas per fluganta blankaĵo tiel, ke neniu kuraĝas eliri, kiam oni rakontis, kiamaniere Kiŝ sukcesis sin levi el la plej humila "igluo" (Loĝejo) de la vilaĝo, ĝis fine li fariĝis la ĉefulo super ĉiuj.

Oni diras, ke li estis inteligenta knabo, sana kaj forta, kaj estis vidinta dektri sunojn. Tiamaniere oni mezuris la tempon tiutempe, ĉar dum ĉiu vintro la suno forlasas la landon, kaj en la venonta jaro aperas nova suno por ke la homoj povu ree varmiĝi kaj rigardi reciproke la vizaĝojn. La patro de Kiŝ estis tre kuraĝa viro, sed li mortis dum tempo de malsatego, kiam li penis subteni la vivon de siaj kunuloj per mortigo de granda polusa urso. Pro tiu forta deziro li ekluktis kontraŭ ĝi, kaj liaj ostoj frakasiĝis. Sed la urso havis multe da karno, kaj la homoj estis savitaj. Kiŝ estis lia sola filo, kaj post la morto de l' patro, Kiŝ kaj la patrino loĝis kune. Sed la homoj estis forgesemaj kaj forgesis la heroaĵojn de l' patro; kaj ĉar Kiŝ estis nur knabo kaj la patrino estis nur vidvino, ili ankaŭ estis forgesitaj, kaj baldaŭ loĝis en la plej humila el la "igluoj".

Iun nokton, kiam la konsilantaro kunsidis en la granda "igluo" de la ĉefulo Kloŝ-Kûan, Kiŝ montris, kia sango trafluis siajn vejnojn kaj kiajn virajn kvalitojn li posedas. Kun kvazaŭ plenaĝula digno li leviĝis kaj atendis la ĉeson de la babilado.

— Estas vere, ke la viando estas porciita al mi kaj mia patrino, — li diris — sed ofte ĝi estas maljuna kaj malmola, kaj krome ĝi enhavas ekstreman kvanton da ostoj.

Ĉiuj ĉasistoj, grizharaj same kiel junaj, konsterniĝis. Neniam antaŭe aŭdiĝis io simila: knabo, kiu parolas kvazaŭ plenaĝulo kaj eldiras severaĵojn rekte al ili. Sed firme kaj serioze daŭrigis Kiŝ:

— Ĉar mi scias, ke mia patro Bok estis eminenta ĉasisto, tial mi parolas tiel. Oni diras, ke Bok havigis pli da viando ol du plej bonaj ĉasistoj; ke per siaj propraj manoj li disporciis ĝin; ke per siaj propraj okuloj li atentis, ke eĉ la plej humila maljunulo kaj maljunulino ricevu justan porcion.

— Na, na! — ekkris la viroj — for la infanon! Enlitigu lin! Li ne estas viro, kiu rajtas paroli al viroj kaj grizbarbuloj!

Trankvile li atendis la ĉeson de la bruego.

— Vi havas edzinon. Ugh-Gluk, — li diris — kaj pro ŝi vi parolas. Kaj vi, Massuk, havas edzinon kaj patrinon, kaj pro ili vi parolas. Mia patrino havas neniun krom mi; pro tio mi parolas. Kiel mi antaŭe diris, kvankam mortis Bok, pro tio ke li ĉasis tro bone, tamen estas juste, ke mi, lia filo, kaj Ikiga, lia vidvino kaj mia patrino, havu sufiĉe da viando, kondiĉe, ke la gento havas abundan provizon... Mi, Kiŝ, filo de Bok, estas parolinta!

Li sidiĝis kaj aŭskultis vigle la fluegon de protesto kaj indigno, kiujn vekis liaj vortoj.

— Knabo parolas en konsilejo! — konsterne murmuris la maljuna Ugh-Gluk.

— Ĉu la infanetoj diras al ni, plenaĝuloj, kion ni devas fari? — demandis Massuk laŭtvoĉe. — Ĉu mi, plenaĝulo, estu mokata de ĉiu infano, kiu petaĉas viandon?

La kolero bolis treege. Li ordonis, ke li enlitiĝu, minacis, ke li havos nenian viandon, ke li estos batata pro lia aroganteco. La okuloj de Kiŝ ekbrilis kaj la sango ekpulsis sub lia haŭto. Dum ili riproĉis kaj mallaŭdis lin, li ekleviĝis.

— Aŭskultu min, vi, viroj — li kriis. — Mi ne parolos plu en tiu ĉi konsilejo, ĝis kiam la plenaĝuloj venos al mi kaj diros: "Estas ĝuste, Kiŝ, ke vi parolu; estas ĝuste, kaj ni tion volas." Jen al vi, plenaĝuloj, mia lasta vorto. Bok, mia patro, estis eminenta ĉasisto. Ankaŭ mi, lia filo, iros kaj ĉasos la viandon, kiun mi manĝos. Kaj sciu, ke tio, kion mi kaptos estos juste disporciita, kaj nek vidvino, nek malfortulo ploros nokte pro tio, ke mankas manĝaĵo, dum la fortuloj ĝemas dolore pro la trosateco. Kaj en la venontaj tagoj hontos la fortuloj, kiuj estas tro multe manĝintaj. Mi, Kiŝ diris ĉi tion.

Mokoj kaj ridaĉoj sekvis lin, sed kun neŝancelebla volo li foriris, sin turnante nek dekstren, nek maldekstren.

La sekvintan tagon li iris laŭlonge de la bordo, kie renkontiĝas la tero kaj la glacio. Tiuj, kiuj rigardis lin dum lia foriro, vidis, ke li kunportas sian pafarkon kaj sufiĉe grandan provizon da ostpintaj sagoj. Ili ankaŭ vidis, ke surŝultre li portas la longan ĉaslancon de sia patro. Estis ridado kaj multe da babilado pri la neniam antaŭe vidita okazo. Neniam knaboj tiel junaj foriris por ĉasi; kaj ĉi tiu iris sola! Kaj ili kapbalancis kaj murmuris kvazaŭ profete, kaj la virinoj kompate rigardis Ikiga'n, kaj la vizaĝo de Ikiga estis serioza kaj malĝoja.

— Li revenos post nelonga tempo — ili diris kuraĝige.

— Li iru; per tio li havos bonan lecionon, — diris la ĉasistoj — kaj li revenos baldaŭ kaj li fariĝos humila kaj malfanfarona por ĉiam.

Sed pasis tago; pasis du tagoj. Kaj je la tria blovis ventego, kaj Kiŝ ankoraŭ forestis. Ikiga ŝiris al si la harojn kaj sur la vizaĝon ŝi ŝmiris fulgon de fokoleo por montri sian ĉagrenon. Kaj la virinoj riproĉis la virojn per maldolĉaj vortoj pro tio, ke ili estis malbontraktintaj la knabon kaj kaŭzis per tio lian morton. Kaj la viroj nenion respondis sed intencis serĉi la kadavron, post kiam la ventego trankviliĝos.

Tamen, la sekvintan tagon, frumatene, marŝis Kiŝ en la vilaĝon. Sed ne honteme li venis. Surŝultre li portis ŝarĝon da viando ĵus akirita. Kaj

fiere li marŝis, kaj arogante li parolis.

— Iru vi, plenaĝuloj, kun hundoj kaj glitveturiloj, kaj laŭiru la vojon, kiun mi tramarŝis dum preskaŭ unu tago — li diris. — Estas sur la glacio multe da viando, ursino kaj du duonkreskintaj ursidoj.

Ikiga treege ĝojis, sed per virsimila mieno li akceptis ŝiajn karesojn, dirante:

— Venu, Ikiga, ni manĝu. Kaj poste mi dormos, ĉar mi laciĝis.

Tion dirante, li eniris la "igluon" kaj manĝis ĝis sato, kaj dormis dudek horojn.

Tiam estiĝis granda dubo — dubo kaj diskutado. Mortigi polusan ursonestas faro tre danĝera, sed multoble pli danĝere estas mortigi ursinon kun idoj. La plenaĝuloj ne povis kredi, ke la knabo, tute sola, povis fari tian mirindaĵon. Sed la virinoj atestis pri la freŝa viando, kun li alportis surdorse, kaj ĉi tiu estis nerefutebla aserto. Fine do ili foriris, plendante, ke tre kredeble, eĉ li vere mortigis la urson, li certe ne distranĉis la kadavron. En la nordlando estas tre necese, ke tio okazu tuj post mortigo. Alie la karno tiel frostiĝas, ke, provante tranĉi, oni difektas la plej akran tranĉilon, kaj urson pezan je tricent funtoj oni ne facile metas sur glitveturilon por ĝin treni tra la malebena glaciaĵo. Sed veninte al la loko, ili trovis ne nur la kadavron (pri kiu ili dubis), sed ankaŭ tion, ke Kiŝ estis distranĉinta la korpon laŭ la maniero de lerta ĉasisto, kaj formetis la internaĵon. Tiel komenciĝis la mistero pri Kiŝ — mistero kiu konstante pliprofundiĝis. Je la dua ĉasiro, li mortigis junan urson, preskaŭ plenkreskan, kaj je la tria, grandan virurson kaj ties kunulinon. Generale li forestis tri-kvar tagojn, sed kelkfoje li estis for dum tuta semajno sur la glacikampo. Ĉiuokaze li rifuzis akompanantojn, kaj la homoj miregis.

— Kiel li faras tion? — ili demandis sin. — Li eĉ ne kunhavas hundon, kaj hundo certe helpus lin.

— Kial vi ĉasas nenion krom ursoj? — foje demandis lin Kloŝ-Kûan.

Kaj Kiŝ taŭge respondis:

— Estas konata afero, ke urso havas la plej grandan kvanton da viando.

Sed oni parolis en la vilaĝo ankaŭ pri sorĉarto.

— Per la helpo de malbonaj spiritoj li ĉasas, — diris kelkaj — tial lia ĉasado sukcesas. Kiel ĝi ja sukcesus, se tio ne estus?

Aliaj diris:

— Eble tiuj spiritoj ne estas malbonaj. Oni scias, ke lia patro estis lerta ĉasisto. Ĉu ne estas eble, ke tiu helpas lin, por ke li fariĝu lerta, pacienca kaj vigla? Kiu scias?

Spite de ĉio, li daŭre sukcesis, kaj la malpli lertaj ĉasistoj ofte estis okupitaj per la alporto de la viando; kaj li disporciis ĝin laŭ justa maniero, kiel lia patro faris iam, antaŭe, tiel li ordonis, ke la plej humilaj maljunuloj kaj maljunulinoj ricevu justajn porciojn, kaj prenis por si mem nur tiom, kiom li bezonis. Kaj pro tiu justaĵo, kaj ĉar li estis tre lerta ĉasisto, oni rigardis lin kun respekto, eĉ kun solena timo. Oni ankaŭ proponis, ke li fariĝu ĉefulo post kiam la maljuna Kloŝ-Kûan eksiĝos je la ofico. Pro liaj faroj la plenaĝuloj atendis lin reaperi en la konsilejo, sed li venis neniam plu, kaj ili hontis demandi pri tio.

— Mi pensas, ke mi konstruos por mi igluon, — iun tagon li diris al Kloŝ-Kûan kaj kelkaj aliaj ĉasistoj. — Ĝi estos granda igluo, en kiu Ikiga kaj mi povos loĝi komforte. Ili kapjesis serioze.

— Sed al mi mankas la tempo. Mia afero estas la ĉasado, kaj per tiu laboro mi estas ĉiam okupita. Do estas juste, ke la vilaĝanoj, kiuj manĝas mian viandon, konstruu mian igluon.

Do la igluo estis konstruata laŭ grandaj mezuroj — laŭ pli grandaj ol la loĝejo de Kloŝ-Kûan. Kiŝ kaj lia patrino translokiĝis en ĝin. Ĝis tiu tempo, depost la morto de Bok, Ikiga ĝuis nenian komforton. Kaj ne nur materian utilon ŝi havis; pro la alta stato, kiun ŝi atingis kaŭze de la mirindajoj de sia filo, oni rigardis ŝin la ĉefa virino en la tuta vilaĝo. Kaj la virinoj vizitis ŝin por peti ŝian konsilon, kaj poste citis ŝiajn saĝajn vortojn, kiam okazis disputoj inter ili aŭ kun la viroj.

Sed la mistero pri la mirinda ĉasado de Kiŝ precipe okupis la mensojn de la vilaĝanoj. Kaj iun tagon Ugh-Gluk rekte akuzis lin pri sorĉarto.

— Oni asertas, — diris Ugh-Gluk, laŭ impona maniero — ke per la helpo de malbonaj spiritoj vi ĉasadas; per tio vi sukcesas.

— Ĉu la viando ne estas bona? — respondis Kiŝ — ĉu iu vilaĝano malsaniĝis post manĝo? Kiel vi scias, ke mi uzas la sorĉarton? Aŭ ĉu vi fariĝis kvazaŭ blinda pro la envio, kiu vin konsumas?

Kaj Ugh-Gluk retiris sin venkita, kaj la virinoj mokis lin. Sed iun nokton en la konsilejo, post longa diskutado, oni decidis spioni lin, kiam li foriros ĉasi, por ke oni sciu liajn metodojn. Do, je la sekvanta ĉasiro, Bim kaj Bon, du el la plej lertaj ĉasistoj, sekrete sekvis lin. Post kvin tagoj ili revenis kun okuloj alŝvelintaj kaj langoj tremantaj, kaj rakontis, kion ili vidis. La konsilantaro rapide kunvenis en la loĝejo de Kloŝ-Kûan, kaj Bim komencis rakonti:

— Fratoj, kiel vi ordonis, ni marŝis malantaŭ Kiŝ, marŝis kaŝe por ke li ne sciu, kaj je la mezo de la unua tago li renkontis grandan virurson. Estis tre granda urso.

— Ne estos ian pli granda — Bon konfirmis kaj daŭrigis. — Sed la urso ne montris sin batalema, ĉar ĝi flankenturnis sin kaj iris malrapide tra la glaciaĵo. Tion ni vidis de la rokoj ĉe la marbordo, kaj la urso proksimiĝis al ni, kaj malantaŭ ĝi marŝis Kiŝ, tute sentime, kaj li kriis laŭtvoĉe, kaj svingis la brakojn kaj faris grandan bruon. Tiam la urso koleriĝis kaj ekstaris rekte sur la malantaŭaj kruroj kaj murmuregis. Sed Kiŝ marŝis ĝis li venis proksimen al la urso.

— Jes, — daŭrigis Bim — rekte ĝis la urso li marŝis, kaj la urso minacis lin kaj Kiŝ forkuris. Sed, kurante, li lasis fali etan pilkon sur la glacion. Kaj la urso haltis kaj flaris. Kaj poste englutis ĝin. Kaj Kiŝ konstante kuris kaj faligis pilketojn, kaj la urso englutis ĉiujn.

La aŭskultantoj ekkriis kun dubo, kaj Ugh-Gluk malkaŝe esprimis sian malkredon.

— Per niaj propraj okuloj ni vidis tion — asertis Bim.

Kaj konfirmis Bon:

— Jes, per niaj propraj okuloj. Kaj tio daŭris, ĝis kiam la urso rekte ekstaris kaj blekegis pro doloro kaj freneze batadis per siaj antaŭaj piedoj. Kaj Kiŝ konstante kuris, ĝis kiam li atingis sendanĝeran lokon. Sed la urso malatentis lin, ĉar

ĝin okupis la turmento kiun kaŭzis al ĝi la pilketoj en ĝia interno.

— Jes, ĝia interno, — interrompis Bim — ĉar ĝi sin gratis kaj ĉirkaŭsaltis kiel ludema hundido; sed per ĝiaj krioj oni povus diveni, ke ĝi ne ludas, sed suferas. Neniam mi vidis tian spektaklon!

— Ne, neniam oni vidis tian, — daŭrigis Bon — kaj krome ĝi estis tiel granda urso!

— Sorĉarto — Ugh-Gluk supozis.

— Mi ne scias, — Bon respondis — mi rakontas nur tion, kion mi vidis. Kaj post mallonga tempo la urso malfortiĝis kaj laciĝis, ĉar ĝi estis tre peza, kaj estis saltinta tre forte, kaj ĝi iris for tra la glaciaĵo, balancante la kapon alflanke kaj multfoje sidiĝante por bleki kaj krii. Kaj Kiŝ postsekvis la urson, kaj ni postsekvis Kiŝ, dum tiu tago kaj ankoraŭ dum tri tagoj ni sekvis lin. La urso malfortiĝis kaj senĉese blekis pro doloro.

— Ĝi estis ensorĉita! — ekkriis Ugh-Gluk. — Certe ĝi estis ensorĉita!

— Verŝajne.

Kaj Bim transprenis la parolon de Bon:

— La urso vagadis jen tien, jen ĉi tien, ĉirkaŭirante kaj reirante sian antaŭan vojon tiel, ke fine ĝi troviĝis tie, kie Kiŝ je la komenco renkontis ĝin. Nun la urso jam estis tute malsana kaj ne povis iri plu. Tial alproksimiĝis Kiŝ kaj mortpikis ĝin.

— Kaj poste? — demandis Kloŝ-Kûan.

— Tiam ni forvenis, dum Kiŝ senhaŭtigis la urson, kaj ni kuris rapide al vi, por ke vi sciu pri la mortigo.

Kaj tiun tagon, posttagmeze, la virinoj hejmentrenis la viandon, dum la viroj kunsidis en la konsilejo. Kiam alvenis Kiŝ, ili invitis lin veni al la konsilejo, sed li respondis dirante, ke li malsatas kaj estas laca. Li ankaŭ diris, ke lia igluo estas granda kaj komforta kaj povas enhavi multajn homojn. Kaj tiel forte ili volis scii pri la okazintaĵoj, ke iris al la igluo de Kiŝ la tuta konsilantaro kun Kloŝ-Kûan antaŭe. Kiŝ estis manĝanta, sed akceptis ilin laŭ ilia rango. Ikiga montriĝis jen fiera, jen embarasita, sed Kiŝ estis tute trankvila. Kloŝ-Kûan rerakontis la sciojn kiujn alportis al li Bim kaj Bon.

— Do ni deziras klarigon, ho Kiŝ, pri la maniero de via ĉasado. Ĉu vi uzas la sorĉarton?

Kiŝ levis la vizaĝon kaj ridetis.

— Ne, ho Kloŝ-Kûan, ne konvenas, ke mi nura knabo, sciu ion pri sorĉistinoj, kaj pri tiuj mi nenion scias. Mi nur eltrovis rimedon, per kiu mi povas facile mortigi la glaciurson, Jen ĉio! Tio estas "cerbarto", ne "sorĉarto".

— Kaj ĉu povas fari tion ĉiu homo?

— Ĉiu homo.

Estis longa silento. La viroj rigardis la vizaĝojn reciproke, kaj Kiŝ daŭrigis la manĝadon.

— Kaj . . . kaj . . . ĉu vi sciigos nin, ho Kiŝ? — fine demandis Kloŝ-Kûan per tremanta voĉo.

— Jes, mi sciigos vin.

Kiŝ, suĉinte oston, leviĝis.

— Estas tute facile. Jen!

Li prenis maldikan pecon da balenosto kaj montris ĝin al ili. La pintoj estas tiel akraj kiel la kudriloj. Li zorge faldis la pecon da osto tiel, ke ĝi kaŝiĝis en lia mano. Tiam, subite, li lasis ĝin refleksiĝi. Li prenis pecon da graso.

— Jen! — li diris. — Oni prenas peceton da graso kaj faras en ĝi kavaĵon. Nun en la kavaĵon oni enmetas la balenoston rigide falditan kaj fiksas ĝin per alia peceto da graso. Poste, oni metas ĝin ekster la domon, kaj ĝi frostiĝas kiel pilko. La urso englutas la pilketon, la graso fluidiĝas, kaj la osto kun akraj pintoj streĉiĝas rekta. La urso malsaniĝas, kaj kiam la urso estas tre malsana, oni mortpikas ĝin. Estas tute simple.

Kaj Ugh-Gluk diris: "Oh!" Kaj Kloŝ-Kuan diris: "Ah!" Kaj ĉiu diris ion laŭ sia propramaniero, kaj ĉiu komprenis.

Kaj tio estas la rakonto pri Kiŝ, kiu vivadis antaŭ longe sur la bordo de l' polusa maro. Ĉar li uzis "cerbarton" kaj ne sorĉarton, li levis sin el la plej humila igluo, ĝis fine li fariĝis la ĉefulo de la vilaĝanoj, kaj, dum sia tuta vivo — oni diras — la ento prosperis, kaj nek vidvino, nek malfortulo laŭtploris dum la nokto pro manko de viando.

El la angla: E. H. Collison.

"REZERVITA KUPEO."

VIKTORO RÁKOŠI.

Antaŭ nelonge okazis fervoja elreligo, pro kio feliĉe nur kvar bovoj estis mortigitaj. Dimanĉe nokte nur mi sola estis en la redaktejo, kiam alvenis la telegramo pri tio. Jus mi volis verki artikolon pri la malpermeso de oranĝimporto (ĉar mi havis la vicon por verki artikolon). Sed la telegramo donis alian direkton al miaj pensoj. Pli ĝuste estos ataki la trafikministron, kaj defendi la fervojan personaron, kiu estas tro ŝarĝata de laboroj, kaj tiel laciĝinta, ke kun prudento oni ne povas respondecigi ilin pro akcidentoj.

La artikolo aperis, kaj kiuj legis ĝin, tiuj tre miris, ke pro kvar bovoj de aliulo, oni faras tiel grandan bruon.

La mirantoj forgesis tiun ĵurnalistan principon, ke hodiaŭ estas pli bone kvar bovoj ol morgaŭ unu otardo. (Hungara proverbo)

La artikolo faris efikon ankaŭ al la oficialaj rondoj, ĉar dum la antaŭĵuĝa esploro ĉiuj estis senkulpigitaj el inter la personaro.

Jam delonge mi forgesis la aferon, kiam venis al mi fervoja konduktoro kaj demandis min, ĉu mi verkis tiun artikolon?

—Jes, — mi respondis.

—Akceptu sinjoro mian dankemon. Mi estis la ĉefakuzato, kaj pro la efiko de via artikolo oni senkulpigis min.

—Mi gratulas vin. Kion vi volas?

—Mi volas esprimi mian dankemon.

—Per kio?

—Mi alportis ŝlosilon, kiu malŝlosas ĉiujn kupeojn. Certe vi jam rimarkis, ke sur la vagonaroj estas multaj kupeoj kun la jena surskribo: **Oficiala kupeo aŭ rezervita kupeo.** Nu mi diras al vi, ke ili plej ofte estas malplenaj.

—Ne diru.

—Sed mi diras. Kaj se vi volas veturi komforte, tute simple vi malŝlosos tian kupeon, okupos ĝin, ŝlosos la pordon, kaj plu eĉ la diablo ne embarasos vin.

Kompreneble, la donacon mi akceptis, kun la plej granda ĝojo.

Matene la alian tagon mi estis veturonta al

Pozsony por partopreni geedziĝfestenon. Kun valizo en la mano, promenante en la perono de la okcidenta stacidomo, mi serĉis konvenan kupeon inter la amaso de vojaĝontoj. Fine mi rimarkis unu **rezervitan kupeon.** Trankvile mi malfermis kaj eniris ĝin.

Iu sinjoro kuŝis tie kaj dormis. Pro la ekbruo de la pordo li vekiĝis, salutis min kaj diris:

—Se mi havus dek-milionojn da pengoj mi aĉetus nutrajon por liveri al la armeo.

—Ĝuste vi farus tion, — mi respondis indiferente.

Dume li rimarkis, ke la pordo estas malfermita, li salutis min kaj subite saltis el la kupeo. Mi bone ridis. Certe li tute same akiris la ŝlosilon kiel mi, kaj nun li forkuris, pensante, ke mi estas la rajta rezervinto de la kupeo.

Zorge mi ŝlosis la pordon, la kurtenon mi malsuprentiris kaj ĝuis la bruon de la perono, la kriojn de centoj da homoj pro kupeo.

La vagonaro ekiris. Ĝis Vacz ĝi ne haltis. Tie je mia miro, malfermiĝis la pordo kaj mi ekvidis nigre vestitan sinjoron kun du viroj aspektantaj kiel servistoj.

—Bonvolu elvagoniĝi, — li diris afable.

Mi konjektis malbonon. Mi elvagoniĝis.

—Ĉu vi estas fervojisto? — mi demandis maltrankvile.

—Ĉu mi? Jes, — li respondis post ioma hezito.

—Ĉu mi devas pagi punmonon?

—Oh, ne, sed estu bonvola veni kun ni.

—Kien?

—Al mi.

—Ĉu pro pridemando? Sed tiam mi malfruos la vagonaron.

—Sed post unu horo venos alia.

—Ni lasu tiun multan superfluaĵon. Mi diros miajn nomon kaj adreson kaj faru proceson kontraŭ mi, pro tio mia ĉeesto ne estos bezonata.

—Sed estos bezonata. Kion fari? leĝo estas leĝo.

Tiam ni jam atingis la antaŭon de la stacidomo. Strangforma ŝlosebla veturilo staris tie.

—Bonvolu enveturiliĝi.

—Mil inferoj, kien ni iros? Tio estas absurdo. Antaŭ kiam mi estus povinta malhelpi, la du servistoj ekkaptis min kaj metis en la veturilon. Ili sidiĝis apud mi, la nigre vestito kontraŭ mi.

Miaj pensoj fulmrapide flugadis en mia cerbo. Se ni estus en la deksepa jarcento, mi pensus, ke la vidvina grafino, kiu adoras min, forrabigas min, aŭ iu monarĥo tiel kolektas sian armeon. Sed en la nuna jarcento tio ne povas okazi, ke en Vacz matene je la naŭa horo virino pro amo forrabigu iun, eĉ se li estus la plej bela inter ĉiuj beluloj.

Mi ekmeditis. Mi malsaĝulo lasis forkuri frenezulon el la kupeo, kiu veturis ĉi tien. Teruro trairis min. Oni opinias, ke mi estas la frenezulo. Kiel mi liberiĝos el tiu ĉi afero.

Mi bonkondutis.

—Ĉu vi kondukos min en frenezulejon? — mi demandis la nigran sinjoron.

—Ne. En privatan sanatorion de Fuchs.

—Sed tie estas frenezuloj, ĉu ne?

—Ne, nur nervmalsanuloj kaj simplaj imagemuloj.

—Kien oni envicigas min?

La nigra sinjoro hezite rigardis min.

—Laŭ sciigo vi apartenas al la imagemuloj.

—Kaj kio estas mia monomanio?

—Tio, ke vi estas Rothschild.

—Vidu, tio ne estus malsaĝaĵo. Pli freneza estus Rothschild, se lia monomanio estus, ke li estas mi.

La nigra sinjoro ne ridetis. Eĉ pli grandajn frenezaĵojn li jam aŭdis.

Sur la teraso de la sanatorio, sinjoro Fuchs jam atendis nin. Surprize mi rigardis lin.

—Miŝka, ĉu vi estas?

Li estis mia kunlernanto.

—Ho, vi estas Kazimero Fuzessy, — ekkriis li ankaŭ pro surprizo.

—Vere, korpe-anime.

—Ĉu vi akompanis mian pacienton? Kvankam ni tiel sciis, ke sola li veturos en rezervita kupeo.

Verŝajne malantaŭ mi la nigra sinjoro mansignadis, ĉar la mieno de Fuchs subite ŝanĝiĝis.

—Ĉu tiel? — li murmuris, — venu en mian ĉambron.

Li mansignis al la aliaj, ke ili restu ekstere, kaj ni paŝis en lian ĉambron. Subite li turnis sin al mi kaj diris:

—Barona moŝto! Kiom mi vendu el la brazilaj biloj en la pariza bilborso?

Esplore li rigardis min, sed mi pli esplore rigardis lin.

—Bonvolu diri barona moŝto, ĉu ni ne aĉetu bagdad-fervojajn bilojn? Oni povus per ĝi gajni multon.

Ĉu li freneziĝis? Mi ĉirkaŭrigardis, se li furioziĝos, per kio mi povus defendi min.

—Barona moŝto, mi havas la honoron transdoni al vi la etaton pri la rio-tintoa orminejo.

Kaj malplenan paperpecon li metis antaŭ min. Subite klariĝis al mi, ke li volas veki en mi la monomanion de Rothschild. Mi ekridis.

—Bone, bone, mia knabo. Vane vi admonas min, mi ne estas tiu, kiun vi pensas.

Kaj mi rakontis al li la tutan aferon, tiel, kiel ĝi okazis de la komenco. Lia mieno pli kaj pli maŝereniĝis, fine jam la plej grandan senesperiĝon mi rimarkis ĉe li.

—En bela embaraso mi troviĝas. Vi liberigis mian frenezulon, kaj la lokaj kuracistoj estas en la apuda ĉambro por kuracesplori lin.

Maltrankvile li tien-reen iris en la ĉambro.

—Kion mi faru? Mi ne povas konfesi, ke la frenezulo forkuris. Oni farus pri mi tian malbonan famon, ke certe bankrotus mia instituto. Kion mi faru, kion mi faru?

Subite li haltis apud mi.

—Nur vi povas helpi min. Ŝajnigu vin freneza.

—Mi ne estas freneza.

—Komprenu. Nur dum la tempo de la kuracista konsultiĝo.

—Ĉu valoras al vi ion la opinio de la kuracistoj pri mi? Mi ne estas tiu, kiun vi atendis.

—Tio faras nenion. Se alvenos la forkurinta paciento, certe mi kuracesplorigos lin.

—Diru al ili, ke ne alvenis la malsanulo.

—Ili jam scias, ke vi alvenis.

—Sed mi estas sana.

—Tio ne estas grava. Fine vi faris tiun ĉi embarason, nun estas via devo helpi min.

Mi spiregis. Bone.

—Nur estu saĝa. Ne forgesu la Rothschild-monomanion.

Post kvin minutoj jam mi troviĝis inter la kuracistoj, kiujn Fuchs prezentis al mi kiel konsilantoj de la pariza bilborso.

—Ah, ĉu vi estas parizano?

Kaj mi komencis paroli kun ili france. Ĉiujn iliajn demandojn mi respondis france, kaj ili nur kapbalancis. Post unuhora esplorado kiam mi jam komencis furioziĝi kaj e s k s c i t i ĝ i, ili forkuris. Fuchs tuj raportis al mi, ke per du voĉoj kontraŭ unu ili deklaris min **neresanigebla frenezulo.** La tria pro mia rigardo, opiniis min idioto.

Post kiam mi kaj mia amiko Fuchs manĝis iom, mi rapide reiris al la stacidomo, por ke mi veturu hejmen al Budapeŝto. Guste tiam la vagonaro staris tie, mi envagoniĝis kaj ekokupis lokon en kupeo kie nur unu viro dormis.

La vagonaro ekiris. La dormanto vekiĝis kaj sidiĝis. Sankta Dio! Kie mi jam vidis tiun ĉi viron? Ĉielo — li estas mia frenezulo, kiun matene mi liberigis.

—Ĉu vi estis en Vacz? — mi demandis embarasite.

—Jes — respondis li tute trankvile.

—Kion vi faris en Vacz?

—Mi aĉetis la episkopan kastelon.

—Ĉu tiel riĉa vi estas?

La kompatindulo ridis feliĉe.

—Ĉu vi ne konjektas, kun kiu vi parolas?

Tuj mi ekmeditis.

—Ĉu ne al barona moŝto Rothschild mi havas la honoron?

—Jes mi estas tiu. Ĉu vi estas malriĉa?

—Sufiĉe.

—Akceptu ĝin.

Kaj li transdonis al mi iun malplenan paperpecon.

—Ĉi tio estas asignilo pri kvincentmil pengoj.

Mi transprenis ĝin. En tiu minuto la pordon malfermis iu ĉasisto, li enrigardis de la koridoro, kaj ekkriis:

—Hej, ĉi tie estas preskaŭ malplena kupeo.

Kaj sen saluto li okupis lokon. La vizaĝo de mia homo komencis ŝanĝiĝi. Fine li turnis sin al la ĉasisto kaj diris:

—Deprenu vian ĉapelon, mi estas barono.

—Min tute ne interesas, eĉ se vi estas mem la mikado de Japanujo,

Pro tio mia homo ekstaris kaj dejetis la ĉapelon de la ĉasisto, sur la plankon. La ĉasisto pro kolero ekkaptis lin. Mia homo grincigis siajn dentojn, ... mi ektiras la danĝerbremson, la vagonaro kun terura grincado ekhaltas, la pasaĝeroj saltas el la vagonoj, la pasaĝeroj de la apuda kupeo krias por kuracisto, ĉar ĉi tie estas frenezulo.

Dume mi stariĝas sur la ĉasiston kaj mian homon, kiuj falis pro la subita ekhalto de la vagonaro, por ke ili ne povu stariĝi.

Tiam en la pordo de la kupeo aperas. **Unu el la Vacz-aj kuracistoj,** kiu deklaris min neresanigebla frenezulo. Li mansignis kaj du fortikaj konduktoroj envenis la kupeon, ili ekprenis kaj ligis min per rimenoj. Ju pli mi kriadis kaj baraktis des pli ili kuntiris la rimenojn. Mi jam preskaŭ svenis pro la kolerego kaj doloro.

Tiel mi atingis Budapeŝton. Tie klariĝis la eraro, antaŭ kiam oni estus reekspedinta min al Fuchs.

El ĉio ĉi tio, ho miaj homfratoj, vi povas lerni, ke nur tiam ni veturu en rezervita kupeo, se ni pagis por ĝi, aŭ se ni estas frenezaj.

El la hungara: L. Rereips.

VIRO EN MARON!

Vincent Blasco Ibanez.
EL "LITERATURA MONDO"

Vespere forveturis de **Torrevella** la velŝipo **Sant Rafel,** plenŝarĝita per salo, al Gibraltar.

La holdo estis tute plena kaj sur la ferdeko la sakoj amasiĝis formante veran monton ĉirkaŭantan la ĉefmaston.

Por trapaŝi de la antaŭo al la malantaŭo de l' ŝipo, la ŝipanoj estis devigataj paŝi sur la bordoj kun danĝera ekvilibrado.

La nokto estis bona; nokto somera, kun steloj plenigantaj la tutan firmamenton kaj kun venteto freŝa, iom neregula, kiu jen plenblovis la grandan velon latinan ĝis ĝemigo de l' masto, jen ekhaltis svene, faligante la grandegan tolon kun flugilsimila brubatado.

La ŝipanaro, kvin viroj kaj unu junulo, vespermanĝis post la ekvetura marlaboro kaj jam puriginte per pano la kaldronon, en kiun de la ŝipestro ĝis la lasta metilernanto ĉiuj enŝovis pecojn da **rollo'** kun marista frateco, malaperis tra la plankpordo ĉiuj ŝipanoj deĵorliberaj por ripozigi sur la malmola matraceto la ventrojn plenplenajn de vino kaj melonsuko.

Ĉe la direktilo restis onklo[2] **Chispes,** sendenta skvalo, kiu akceptis kun senpaciencaj gruntoj la lastajn ordonojn de la ŝipestro, kaj apud onklo **Chispes** sidis Johano, metilernanto, kiu faris en **Sant Rafel** sian unuan vojaĝon ... kaj li estis tre dankema al la onklo, ĉar dank' al li oni akceptis lin en la ŝipanaron, sufokante tiamaniere lian malsaton, kiu ne estis malgranda.

La mizera velŝipo ŝajnis al Johano ia admirala militŝipo, ia ensorĉita barko naviganta tra la maro de la abundeco. La vespermanĝo de tiu nokto estis la unua vespermanĝo serioza, kiun li ĝuis dum sia vivo.

Li estis deknaŭjara, malsata kaj nuda kvazaŭ sovaĝulo. Li dormadis en ruiniĝinta barko, kie ĝemetis kaj preĝadis lia avo senmova pro reŭmatismo; dumtage li helpis albordigi barkojn, deŝarĝi korbojn da fiŝo, li iris, kiel parazito, en tiajn ŝipojn, kiuj persekutas la tonfiŝon kaj la sardinon, por porti hejmen plenmanon da ili. Sed nun dank' al onklo **Chispes,** kiun li tre amis pro tio, ke li estis konanta lian patron, li estis vera maristo, li jam estis survoje por fariĝi taŭga homo, li povis **kun plena rajto** enŝovi la brakon en la kaldronon, kaj li eĉ uzis ŝuojn! ... la unuajn dum sia vivo ... ili estis du grandaj ekzempleroj kapablaj navigadi same kiel fregato ... rigardante ilin li eniĝis en maron de admirado. Kaj oni parolaĉis ankoraŭ, ke la maro! ... Nu ... se tia, ĝi estas la plejbona metio en la mondo!

Onklo **Chispes,** ne forigante la rigardon de la

ŝipantaŭo, nek la manojn de sur la direktilo, kurbigante sin por esplori la mallumon inter la velo kaj la amaso da sakoj, aŭskultis lin kun bonkora rideto.

— Jes, vi ne elektis malbonan metion. Sed ĝi havas bankrotojn. Vi vidos ilin... kiam vi havos mian aĝon... Sed via loko ne estas ĉi tie: iru al la ŝipantaŭo kaj avizu, se vi vidas antaŭ ni ian ŝipon.

Kaj Johĉjo kuris sur la bordo kun la memfida trankvilo de marborda vagulo.

— Zorge, he, zorge!

Sed li jam estis en la ŝipantaŭo kaj sidiĝis sur la busprito, esplorante la nigran surfacon de la maro, kie reflektiĝis kiel serpentoj la lumfadenoj de la steloj.

La velŝipo, dikventra kaj peza, falis post ĉiu ondego kun solena ĉap!, resaltigante la akvogutojn ĝis la vizaĝo de Johĉjo, du fosforantaj ŝaŭmfolioj eglitis el la du flankoj de la dika ŝipantaŭo, kaj la velo plenblovita, kun sia pinto perdiĝinta en mallumo, ŝajnis grati la ĉielon.

Al kia reĝo kaj al kia admiralo estis pli bone ol al ŝipjunulo de lia **Sant Rafel!** Brr!

Lia ventro plenplena salutis lin per ruktoj de kontenteco. Vivo belega!

— Onklo **Chispes**... cigaredon.

— Venu prenu ĝin.

Johĉjo ekkuris sur la bordo de la flanko kontraŭa al la vento. Estis momento kvieta kaj la velo friziĝis kun fortaj ekmovoj minacante fali sveninte laŭlonge de la masto. Sed venis ventblovo kaj la ŝipo kliniĝis rapidmove; Johĉjo gardis la ekvilibron, alkroĉiĝis al la ekstremo de la velo kaj en la sama momento ĉi tiu ekplenbloviĝis kvazaŭ por krevo, pelante la velŝipon kun granda rapideco, kaj forpuŝante la tutan korpon de la junulo per forto tiel nerezistebla, ke ĝi forjetis lin kiel per ŝtonĵetilo.

Kun la bruo de la akvo, kiam ĝi englutis Johĉjon, kredis tiu ĉi aŭdi ekkrion, vortojn malprecizajn; eble estis la maljuna direktilisto, kiu ekkriis: Virq en la maron!

Johĉjo malsupreniris multe, multe, multe!, duonkonscie pro la ekbato, pro la neatendo de la ekfalo, sed antaŭ ol kompreni klare tion, kio al li okazas, li vidis sin braksvinganta, forte ensorbanta la freŝan venteton de la maro... Kaj la ŝipo? Li jam ne vidis ĝin. La nokto estis tre malluma; multe pli malluma ol vidate el la ferdeko de la velŝipo.

Li kredis ekvidi blankan makulon, fantomon flosantan en la malproksimo sur la ondegoj kaj li naĝis al ĝi. Sed subite li jam ne vidis ĝin tie, sed en alia loko pli malproksima, kontraŭa al la unua, kaj li ŝanĝis la direkton, naĝante kun la tuta forto, sed ne sciante kien li naĝas.

La ŝuoj pezis al li kvazaŭ ili estus plumbaj; malbenindaj! la unuan fojon kiam li uzas ilin!

La ĉapo turmentis liajn brovojn, la pantalono tiris lin kvazaŭ ĝi atingus la fundon de la maro kaj balaus la akvon.

— Trankviliĝu, Johĉjo, trankviliĝu.

Kaj li forjetis la ĉapon, bedaŭrante ne povi agi same kun siaj malbenindaj ŝuaĉoj. Troa memfido. Li naĝis tre lerte. Li sin sentis sufiĉe forta por du horoj. Tiuj sur la ŝipo revenos por serĉi lin: malsekiĝo kaj nenio plu... Ĉu tiel facile mortas la homoj? Dum tempesto, kiel mortis lia patro kaj lia avo, bone; sed en nokto tiel bela kaj kun bona maro, morti forpuŝite de velo estus ja morto malsprita.

Kaj li naĝis, naĝis ĉiam kredante vidi tian ŝanceliĝantan fantomon, kiu ŝanĝis la lokon kaj esperante, ke el tiu mallumo aperos la **Sant Rafel** serĉante lin.

— He! Onklo Chispes!... ŝipestro!

Sed la kriado lacigis lin, kaj dufoje la ondegoj ŝtopis al li la buŝon.

Malbenindaj! El la ŝipo ili ŝajnis sensignifaj, sed meze de la maro, enigita ĝis la kolo kaj devigata movi la manojn konstante por subteni sin, ili sufokis, batadis lin per sia verda ondomovo, malfermante antaŭ li fundajn kaj movigantajn kavojn, kiuj tuj fermiĝis kvazaŭ ili volus engluti lin.

Li fidis ankoraŭ, sed kun certa maltrankvilo, je siaj du horoj de naĝrezisto. Jes: li fidis je ili.

Du horojn kaj pli li ja naĝadis apud la marbordo... kaj sen laciĝo. Sed tio estis dum sunbrilaj horoj, en tiu maro de blua kristalo, vidante interne, tra ĝia fantazia diafaneco, la flavkolorajn rokojn kun iliaj pintaj herbetajoj kiel verdaj koralbranĉoj, la rozkolorajn konkojn, la perlamotajn stelojn, la helajn florojn kun karnosimilaj folioj, kiuj tremetas, tuŝitaj de la arĝenta ventro de l' fiŝoj; sed nun li troviĝis en maro de inko, perdite en la mallumo, embarasite pro la vestajoj, havante sub siaj piedoj kiu scias kiom da ŝipoj detruitaj, kiom da kadavroj senkarnigitaj de la kruelaj fiŝoj! Kaj li ektremis je la kontakto de sia malseka pantalono, kredante eksenti la tuŝon de iliaj dentoj, akrepintaj kiel ponardoj...

Laca, malforta, li dorsekuŝiĝis fordonante sin al la ondegoj. La gusto de la vespermanĝo supreniĝis al lia buŝo. Malbeninda manĝo kaj kiom kostas gajni ĝin! Fine li eble mortos tie...

Sed la vivinstinkto levis lin el tiu teniĝo.

Eble oni serĉas lin kaj se li estas kuŝanta, oni preterpasos apud li ne vidante lin. Refoje naĝadi kun la korpremo de l' malespero; levigante sin per la kresto de la ondegoj por rigardi pli malproksimen; irante tien kaj reen, movante sin ĉiam en unu sama cirklo.

Oni forlasis lin kvazaŭ ĉifonon falintan el la ŝipo. Dio mia! ĉu tiel facile oni forgesas homon? Sed ne: kredeble oni serĉadas lin en tiu momento. "Lia" ŝipo kuris tre rapide: antaŭ ol oni estus suprenirintaj al la ferdeko kaj malligintaj la velon, ĝi jam estus je pli ol unu mejlo.

Kaj karesante ĉi tiun iluzion li enfundiĝis dolĉe, kvazaŭ oni tirus lin de la ŝuoj... Li eksentis en la buŝo la salpetran maldolĉon: liaj okuloj blindiĝis, la akvo sin fermis super lia razita kapo; sed inter du ondegoj formiĝis malgranda akvoturno, montriĝis du manoj nerve kuntiritaj kaj li reaperis.

Al li dormiĝis la brakoj: la kapo kliniĝis sur la bruston kvazaŭ venkita de dormemo. Al Johĉjo ŝajnis, ke la ĉielo tute ŝanĝiĝis; la steloj estis ruĝaj kiel sangogutoj, jam ne timigis lin la maro; li sentis deziron fordoni sin al la akvo, ripozi.

Li rememoris pri sia avino, kiu en tiu momento eble pensas pri li. Kaj volis preĝi same kiel milfoje li vidis sian avinon tion farantan.

Patro nia, kiu estas en la ĉielo... Li preĝis

mense, sed ne atentante pri tio, kion li faras. La lango moviĝis mekanike, kaj li ekdiris per voĉo tiel raŭka, ke ĝi ŝajnis al li el aliulo: Friponoj! perfiduloj! vi forlasas min!...

Li dronis denove: malaperis sensukcese barakante por sin subteni. Iu tiris lin de la ŝuoj... Li serĉis en la mallumo, trinkante akvon, rigide, sen fortoj, sed ankoraŭ senkonscie li ree aperis sur la surfaco.

Nun la steloj estis pli nigraj ol la ĉielo eliĝante el ĝi kiel inkogutoj.

Ĉio finiĝis... ĉi tiu fojon li vere iris funden: lia korpo estis plumbo, kaj malsupreniris en rekta linio, trenita de la novaj ŝuoj: kaj lia falo estis al la abismo de la ŝipoj rompitaj kaj la skeletoj elmanĝitaj, la cerbo ĉiam pli kaj pli perdita inter densaj nebuloj, ripetadis:

Patro nia... Patro... friponoj! friponoj! perfiduloj! Vi forlasis min!!

[1] Valencia rondforma pano.

[2] En Valencio oni nomas onklo iun ajn sinjoron kaj ofte, kiel en ĉi tiu okazo, la esprimo estas serĉa.

El la kataluna: Antoni Dura.

LA VIVO DE HOMO.

S. AN-SKI.

EL "LITERATURA MONDO"

Kiam homo estas naskiĝanta, donas la Ĉiopova signon al la anĝelo nomata "Lajla" (Nokto) kaj ekdiras al li jene:

— Sciu, ke ĉi-momente naskiĝas tiu kaj tiu homo de tiu kaj tiu spermoguto kaj venigu ĝin al mia trono.

Kaj la anĝelo plenumas la ordonon de la Ĉiopova kaj alportas la spermoguton al la sojlo de la Dia trono.

Kaj eldonas la Ĉiopova la verdikton por la homo naskiĝonta: ĉu li estu de sekso vira aŭ virina, fortulo aŭ malfortulo, belulo aŭ malbelulo.

Sed ĉu li estu bonulo aŭ malbonulo, justulo aŭ petolulo — tion Dio ne destinas.

Kaj Dio, benata Li estu, donas signon al anĝelo estranta la animojn, dirante: — Flugu Edenon kaj prenu el la animejo tiun kaj tiun animon tiel aspektantan.

Ĉar ĉiuj animoj jam kreitaj kaj kreotaj de la mond-origino ĝis la fino de ĉiuj generacioj estas preparataj por homoj.

Kaj la anĝelo, estranta la animojn, prenas el la animejo la difinitan animon kaj starigas ĝin ĉe la sojlo de la Dia trono.

Diras al ĝi la Ĉiopova jene:

— Animo! Eniru en la spermoguton, eniĝu en ĉiujn sescent sesdek ses[2] membrojn kaj tio estu via loĝejo, ĝis kiam finiĝos la tempo de la homa Vivo.

Kaj la animo genufleksas kaj falas vizaĝaltere antaŭ la Eternulo kaj malfermante la lipojn ekparolas kun granda tremo kaj peto:

— Estro de ĉiuj mondoj, sufiĉas por mi tiu mondo, kie mi troviĝas de la tempo de mia kreiĝo. Kaj se plaĉas al via Ĉiopova volo, ne enigu min en la malindan guton, ĉar mi estas sankta kaj pura.

Kaj la Ĉiopova respondas al la animo, jene:

— La guto, kien mi enigas vin, ankaŭ estas mondo sankta kaj senlima. Kaj ĉi tiu mondo pli konvenas al vi ol tiu, kie vi troviĝas nun. Ĉe via kreado mi jam destinis vin por ĉi tiu guto.

Kaj la animo ploras kaj ĝia plorado aŭdiĝas de unu mondfino ĝis la alia. Kaj kune kun ĝi ploras ĉiuj aliaj animoj kaj anĝeloj.

Sed la Ĉiopova ne atentas ilian ploradon kaj perforte enigas la animon en la spermoguton.

Kaj Li vokas la anĝelon, nomatan "Lajla", kaj ordonas revenigi la guton en la uteron de la patrino kaj ĉi momente la spermoguto estiĝas ido en la utero de la patrino.

La Ĉiopova donas al la novkreita ido du gardanĝelojn, luman kaj malĝojan.

Prenas ĉiumatene la luma anĝelo la idon, kondukas en Edenon kaj montras al ĝi la "Cadikim" (justulojn), kiuj sidas en grandega ombro kun kronoj sur la kapoj kaj estas traigitaj per la luma rebrilo de la "Ŝhino" (dia spirito). Kaj la luma anĝelo demandas la naskoton:

— Ĉu vi vidas ĉi tiujn?

Respondas la ido:

— Mi vidas ilin.

Kaj redemandas la anĝelo:

— Ĉu vi scias, kiuj estas ĉi tiuj?

Kaj respondas la naskoto:

— Mi ne scias, kiuj ili estas.

Malfermas la anĝelo siajn lipojn kaj diras:

— Ili, kiujn vi vidas en pompo kaj brilo, estis, kiel vi, kreitaj en utero de siaj patrinoj kaj en suferojn ili naskiĝis kaj vivis sur la mondo inter mortemuloj. Sed ili plenumis la volon de la Ĉiopovo, kiu kreis ilin. Pro tio ili indis esti kronitaj.

Kaj vespere prenas la malĝoja anĝelo la naskoton, kondukas en Gehenon kaj montras al ĝi la "Ŝaim" (pekulojn), turmentataj per eternaj doloroj kaj enprofundigitajn en la abismon de honto. Kaj iliaj vizaĝoj estas mallumaj, iliaj rigardoj senesperaj kaj ilia voĉo estas sufokata ĝemego. Kaj la malluma anĝelo demandas la idon:

— Ĉu vi vidas ĉi tiujn?

Respondas la naskoto:

— Mi vidas ilin.

Kaj redemandas la anĝelo:

— Ĉu vi scias, kiuj estas ĉi tiuj?

Kaj respondas la ido:

— Mi ne scias, kiuj ili estas.

Malfermas la anĝelo siajn lipojn kaj diras:

— Ili, kiujn vi vidas en honto kaj turmentoj, estis, kiel vi, kreitaj en uteroj de siaj patrinoj kaj en sufero ili naskiĝis kaj vivis sur la mondo inter mortemuloj. Sed ili ne plenumis la volon de tiu, kiu ilin kreis. Pro tio ili estas kondamnitaj al eterna mallumo kaj dentgrincado.

Kaj nun sciu, ke ankaŭ al vi estas destinite naskiĝi kaj vivadi en la sama mondo. Kaj vi povas elekti la irotan vojon.

Ĉiutage portas la anĝeloj, la luma kaj la malĝoja, la novkreitan idon kaj montras al ĝi la mondon de unu fino ĝis la alia.

Kaj la naskoto penetras en ĉiujn voĉojn kaj sonojn, en ĉiujn kolorojn kaj desegnojn, kaj ĝi vidas ĉiujn ĝojojn kaj dolorojn de la mondo. Kaj ĉiunokte bruligas la anĝeloj sur la kapo de la ido lumon kaj instruas al ĝi la tutan "Toron" kaj malkovras al ĝi ĉiujn misterojn, kaŝitajn jam de la

mond-origino, kaj levas por ĝia rigardo kurtenrandon de la eterneco. Kaj kiam finiĝas la naŭ monatoj, venas al la naskoto la anĝelo, nomata "Lajla" kaj demandas ĝin:

— Ĉu vi rekonas min?

Respondas la ido:

— Mi vin rekonas.

Kaj la naskoto demandas:

— Por kio vi alvenis ĉi-hore al mi?

Kaj respondas al ĝi la anĝelo, dirante:

—Venis la horo de via naskiĝo. Vi devas eniri en la homan mondon.

Kaj diras la naskoto:

— Mi tre kontentas pri la mondo, en kiu mi troviĝas. Kaj se tio estas laŭ la volo de la Ĉiopova, mi petas vin ne enkonduki min en la pekan mondon de l' mortemuloj kaj sensciuloj, ĉar senpeka mi estas kaj ĉioscia. Respondas la anĝelo:

— La mondo kien mi enkondukas vin, estas mondo de vivo kaj justo. Vin kreante Dio antaŭdestinis vin nur por ĉi tiu mondo.

Ploras la naskoto. Kaj ĝia plorado aŭdiĝas de unu mondangulo ĝis la alia kaj kune kun ĝi ploras ĉiuj idoj en la patrinuteroj kaj ankaŭ ĉiuj anĝeloj.

Sed la Ĉiopova ne atentas ilian ploradon.

Kaj la anĝelo, nomata "Lajla", estingas la kandelon super la kapo de la naskoto kaj forigas la du anĝelojn, la luman kaj la malĝojan. Kaj tiam alvenas la anĝelo "Pora" (anĝelo de forgesemo) kaj ekpinĉas ĝiajn lipojn kaj la naskoto forgesas per unu fojo ĉion, kion ĝi vidis kaj aŭdis. Kaj el ĝia cerbo malaperas la instruo, kiun ĝi lernis, kaj tio, kion ĝi vidis malantaŭ la suprenlevita kurtenrando de la eterneco. Sole en la profundaj kaŝejoj de ĝia koro restas la resono de ĉio vidita kaj lernita.

Kaj la anĝelo "Lajla" elirigas ĝin perforte el la patrina utero.

Kaj de tiu tempo la homo trairas sep mondojn:

En la unua mondo li similas novelektitan reĝon, kiun ĉiuj salutas, bonvenigas kun ĝojo kaj alportas donacojn.

En la dua mondo li similas al kapro, kiu sin paŝtas sur la herbejo, saltadas ĝoje, senzorge, kaj konsumas herbon, kiun ĝi ne semis.

En la tria mondo li similas ĉevalidon ne sciantan pri abstinenco kaj li ebrias pro libereco kaj pasioj.

En la kvara mondo li similas rapidkuran ĉevalon, kiu galopas ĝoje en jungo kaj ne sentas la veturilon kun la malpezaj veturantoj.

En la kvina mondo li similas al azeno, plenŝarĝita kaj pasanta sub la vipoj de la pelisto.

En la sesa mondo li similas al hundo, tiranta ĉion, kion ĝi povas kaj li bojkrias ĉiun alproksimiĝanton.

En la sepa mondo li similas al simio, kiu aspektas kiel homo kaj tamen ne egalas kun homo, kaj li perdas la prudenton kaj ĉiuj lin primokas kaj malobeas.

Kaj jen alvenas la horo de la homa morto.

Kaj ree venas al li la anĝelo, nomata "Lajla," kaj demandas:

— Ĉu vi rekonas min?

Respondas la homo:

— Mi rekonas vin.

Kaj la homo demandas:

— Por kio vi alvenis ĉi-hore al mi?

Kaj la anĝelo respondas, dirante:

— Mi venis forpreni vin el la mondo. Ekbatis la horo de via morto.

Kaj la homo ne volas foriri el la mondo, kaj diras:

— Vi elkondukis min du fojojn el du mondoj, el kiuj mi ne volis foriri. Kial vi ree venis eliri min el ĉi tiu mondo?

Kaj maldolĉe ploras la homo kaj krias, kaj lia kriado portiĝas de unu mondfino ĝis la alia, sed nenia vivulo lin aŭdas, ĉar disiĝus ĉiu koro. La strigo, sole, aŭdas la kriadon kaj respondas.

Kaj la anĝelo, nomata "Lajla" diras al la homo:

— Sciu, ke perforte vi estis kreita, kontraŭvole vi vivis kaj kontraŭvole vi mortos kaj estos responda antaŭ la Reĝo de la reĝoj, benata estu Lia nomo!

Kaj la anĝelo forprenas la animon de la homo.

[1] Ĉi tiu verketo apartenas al la mirinda novel-serio "Antikvaĵoj" en kiuj la aŭtoro prilaboras en belega biblia lingvo la legendojn kaj kredojn de la juda popolo.

[2] Laŭ antikvaj sanktaj libroj la homa korpo konsistas el 666 membroj.

El la juda: **J. Jurysta.**

MALSANGRO.

De Ramon Casellas.

EL LA "KATALUNA ANTOLOGIO"

Tiun matenon estis sonorinta kvarono de la kvina, kaj la stalisto ankoraŭ ne estis malferminta la pordojn de l' ĉevalejo. Sonoris la duono... ankoraŭ ne.

—Eble li endormiĝis, fripono... — grumblis kun furiozo la ĉaristoj.

—Diabla maljunulo! — diris unu. — Ĉu vi ne volas malfermi, je cent demonoj?

—Malsangro! — kriis alia, frapante al la pordoj per ŝtono. — Malfermu, fulmon de Dio!

Sed Malsangro ne respondis vorton, nek donis signojn de vivo.

Tiam unu el la junuloj grimpis tra la fenestro de l' pajlejo kaj post unu salto troviĝis en la ĉevalejo. Post momento malfermiĝis larĝe la pordoj de la stalo kaj eliris la junulo, kriante terurite:

—Malsangro estas mortinta!

—Mortinta?

—Jes, mortinta... Ĉevalo hufobatis lin.

Ĉiuj ĉaristoj enrapidis internen, kaj tie, en angulo, sub erpilo, ili vidis Malsangron, sternitan, sur la sterko, malvarman, glacian, malpuran de pajleroj kaj makulitan de koagulita sango... Iom malproksime kuŝis ĉevalo kun la ligoŝnuro pendanta ĝis sur la planko...

Ĉiu vidis tuj, kio okazis tie la nokton. Ĉevalo malligiĝis..., La stalisto volis religi ĝin... sed la besto piedbaraktis... per la unua frapo senkonsciigis lin, kaj poste, kvazaŭ ne sata, hufbatis lin.

Ĉiuj ĉaristoj rigardadis la kadavron, enpensaj kaj teruritaj.

Fine, unu rompis la funebran silenton.

—Vi scias, kion mi diras? Ke... li ne povis mortiĝi aliamaniere, la malbonulo...

—Fide al Dio, ja ne! — respondis alia.

—Ne multe, ke li, kiu mortigis la bestojn per turmentoj, mortis sub la hufoj de ĉevalo.

—Estas kvazaŭ revenĝe...

—Malbona fino...

—Nomu ĝin puno de l' infero...

Kaj tra la memoro de tiuj viroj pasadis rememoroj pri la teruraj martirsuferoj, kiujn la stalisto travivigis de la bestoj, kiel ekzekutisto sin amuzanta per la doloroj de l' viktimoj. Ja tiuj viroj estis se necese batemaj kaj eĉ sovaĝaj kaj senanimaj... sed, ne tiom, fulmo! — tiaj ne! kiel tiu sovaĝulo senkompata...

Pro bagatelo, jen ŝi havis lin, kun la vipo en la aero, — kvazaŭ pikita de vespo, kaj blasfemanta kiel malbona spirito. Kaj jen prenis ĉevalon kaj frapis sur ĝian nazon ĝis tiu rompis al si la kruro-jn.

Aliajn fojojn li torturis ilin trankvile, kun malvarma sango, per krueleco de pacienca homo.

—Mi, — diris unu el la rondo — fojon vidis lin, kiam li metis al ĉevalino stangon en la orelon, pikante kaj suferigante ŝin...

—Mi, — rediris alia — unu tagon kaptis lin, dum li plenigas per sablo la okulojn al unu ĉevalo!

—Nu, do... forte!

—Nu, do... ke li kondamniĝu pro malbona animo!

—Li ne povis finiĝi alimaniere...

Sed tiam eliris el la rondo maljunulo kaj kun kompata mieno diris:

—Knaboj... eble vi ne dirus, kion vi diradas, se vi scius la historion pri tiu viro. Eble, vi eĉ havus por li kompaton, se vi konus la malfeliĉojn, kiuj sur li pasis. Mi konis lin junan, bubon preskaŭ. Li jus eliris el la Sankta Domo... ĉar, malfeliĉa, li estis bastardo, estis senpatrulo... Li kreskis maldika, malsanema... kaj estante tiel obeema, tiel bona, ĉe l' najbararo de Poblet li kompatigis ĉiun. Pro kompato oni instruis lin gvidi ĉaron, tiam dum la konstruoj ĉe Bogatell. (Akvofluo, kiun la urbo kovrigis per arkaĵo, sub strato.) La knabo refariĝis... revekiĝis... fariĝis matura viro... Post kelkaj jaroj, li eĉ enamiĝis de knabino el la "Camp de l'Arpa" kaj edziĝis kun ŝi. Tiu viro ne deziris pli grandan feliĉecon kaj opiniis sin pli feliĉa, ol reĝo... Kiam li vidis sian edzinon gravedan, li ne eltenis sian ĝojon. Mi memoras tion, kiel hieraŭan okazon... Tiam ni laboris ĉe la remparoj de Sankta Petro, kiujn oni disfaligas. Ŝi, plengraveda, venis ĉiun tagmezon porti al li la manĝon. Ili ambaŭ sidiĝis ĉe ombro de arbo, apud la ĉaro, kaj rigardadis sin mirefiksitaj, kvazaŭ neniam estus sin vidinta. Sed... jen unu tagmezon, kiam plej senzorge ili rigardadis unu la alian, la ĉevalo, kiun li mastras, pikita de muŝoj aŭ ial ajn, levas la kurojn kaj svinge hufofrapas la virinon sur la mezo de l' ventro... La virino falis sternite, sen signoj de vivo... Ni ĉiuj alkuras, metas ŝin sur portilon kaj portas kurante hejmen...

—Kaj... ŝi mortis? — demandis la ĉaristoj.

—Mortis. Mortis ŝi... mortis la ido, kiun ŝi portas en la interno... kaj de tiam, ŝia edzo ŝajnis freneza... kaj rigardis ĉevalon, kvazaŭ li vidas la malbonan spiriton.

Ĉiuj ĉaristoj restis enpensiĝe, rigardadante la kadavron de la stalisto.

Trad. Josep Grau Casas, L. K.

LA LASTA KURACILO

De Nikola Naĉov

EL LA "BULGARA ANTOLOGIO"

Delonge konsumiĝis la malsanulino — daŭrigis mia funebranta amiko, kun kiu mi promenadis laŭ senbrua aleo de la Boris-ĝardeno — kaj, fine, ŝia malnova neforigebla malsano enlitigis ŝin. Malgaje pasadis la monatoj — du, tri, kvin, dek... tuta jaro, proksimume du jaroj. Multajn sendormajn noktojn ni pasigis, ni laciĝis per kurado al kuracistoj kaj apotekoj. Ĉiu espero estis jam perdita. Malhela fariĝis nia domo kaj tute senorda. La kuracistoj jam nevolonte venadis: Kaj malgraŭ niaj petoj kaj iliaj promesoj por morgaŭa vizito, ili venadis post 3—4 kaj pli multaj tagoj. Ili ĉiam senkulpigis sin, ĉu per troa laboro, ĉu per forgesemo. Ili ankaŭ jam estis teditaj kaj ne plu sciis kion diri kaj kiajn kuracilojn rekomendi. Malgajaj kaj enpensemaj, ili mallonge kaj kvazaŭ kontraŭvole respondadis niajn demandojn, kaj la malsanulino ĉiam fikse rigardis kaj tutforte penis diveni iliajn sekretajn pensojn. Niajn konstantajn demandojn ĉe la strata pordo unuj respondis per brovkuntiroj, per okulmallevoj igante nin mem konjekti tion, kion ili ne volis malkaŝe diri, aliaj ĉiam ripetadis la saman frazon: „Helpilo ne ekzistas!" La malsanulino ĉiam demandis: „Kion diris la kuracisto?" kaj nia respondo estis ĉiam la sama, „Li diras, ke vi resaniĝos!" — kaj ni penis kaŝi la teruran veron.

De multaj kuracistoj sinsekve ni petis konsilon. Kiun ni ne konis kaj pri kiu ni ne aŭdis, lin ni ne konsultis. Oni ĉiam esperas: eble en sekreta angulo de nova libro iu kaptis la kuracrimedon de la malsano; la medicino estas scienco vasta, ĝi senĉese disvolviĝas kaj ofte nin mirigas kaj ĝojigas per siaj novaj eltrovaĵoj por sanigo de la suferanta homaro.

Tamen... helpilo ne ekzistis, kaj la malsanulino ĉiam kuŝis droninta en teruraj pensoj kaj turmentoj kaj ĉiam pli malbonfartis. Ni ankaŭ estis malgajaj kaj malesperigitaj.

Fine ni venigis la kuraciston: X. Y. Z. Ni konstatis, ke ni estis iom konataj unu al la alia: antaŭ longa tempo en la gimnazio de la urbo N. mi estis kunlernanto de lia frato — ni estis bonaj amikoj kaj kune finis la gimnazion.

La kuraciston estis juna, nigrokula belulo, elegante vestita — enlintuj enamiĝis eĉ la plej senpasia lernantino. Gaja kaj interparolema, li plej detale demandis pri la disvolviĝo de la malsano de ĝia komenco eĉ ĝis la lasta momento kaj plej zorgeme li priesploris la malsanulinon. De tempo al tempo agrabla rideto radiis de lia simpatia vizaĝo. La malsanulino persiste sekvis per la rigardo ĉiun lian movon, penis diveni ĉiun lian sekretan penson kaj avide kaptis ĉiun lian vorton. Dio mia, ŝi kaj ĉiuj ni, la ceteraj, atendis de li ian bonan vorton, esperigan parolon.

— Nun, donu al mi la receptojn, sed ĉiujn! — fine grave kaj ordoneme diris la kuraciston, ĉiam gaja kaj ridetanta.

Tuj ni kolektis la receptojn kaj donis ilin al li. Ili ja estis granda amaso, — ankaŭ sufiĉe granda amaso da receptoj estis perdita.

Longe la kuracisto zorgeme ilin esploris, kaj ree de tempo al tempo mokeme balancis la kapon.

La malsanulino kaj ni ankaŭ atentege observis liajn movojn kaj senpaciencege ni ĉiuj atendis lian ekparolon...

Fine la kuracisto, kvazaŭ indigneme, elkriis:

— Estiminda sinjorino, pardonu! Mi ŝatas ĉiam paroli laŭ la vero kaj precipe nun mi tion devas fari, ĉar mi forte indignas. Mi bone scias, ke mi ne agas kolegece, sed en la nuna momento mi devas malkaŝe paroli. Memkompreneble, ankaŭ ni, la kuracistoj ne povas havigi animon, ĉar tiam ni ja helpus nin mem. Estas okazoj, ke rimedo por helpo ne ekzistas, ke la medicino ankaŭ estas senforta. Sed ĉe vi ni tute ne havas similan okazon. Mi laŭte deklaras: Jetu ĉiujn ĉi receptojn en la fajron. Miaj estimataj kolegoj tute ne klopodis ekkoni vian malsanon, aŭ — eble — ili ne povis ĝin ekkoni. Guste pro tio mi fortege indignas... Krome, kelkaj el tiuj pastroj de Eskulapo delonge, jam delonge adiaŭis la studentan benkon kaj kune — la sciencon, multajn al ili antaŭe konatajn aferojn ili forgesis kaj novajojn ili ne lernis. La pasintan jaron en Berlino oni eltrovis certe efikan kuracilon por via malsano. Sinjorino, mi juras, ke plej longe en la daŭro de 15—20 tagoj mi resanigos vin. Pri tio mi garantias per mia kapo. Vi povas kalkuli je mia honesta parolo. Kraĉu je mi, nomu min... se en la dirita limtempo tio ne okazos... Dekojn da malsanuloj de via malsano mi jam resanigis.

Kaj — mirinde! — la kuracisto citis nomojn de multaj konataj al ni geviroj, junaj kaj maljunaj Sofianoj — ĉiuj tiutempe vivaj, sanaj kaj gajaj.

Poste la kuracisto skribis 1—2 receptojn, klarigis detale al ni, kiam kaj kiel oni devas uzi la kuracilojn, insistis, ke ni plej ekzakte apliku liajn konsilojn kaj la rekomenditan de li dieton. Fine li gaje adiaŭis nin, kaj triumfante kaj ridante li eliris.

Ĉe la strata pordo kvazaŭ subite ion rememorinte, li rapideme rigardis sian poŝhorloĝon kaj diris, ke li sufiĉe multe malfruiĝis: li diris, ke li devas viziti aliajn pacientojn, en la plimulto serioze malsanajn, kaj rapide li foriris promesinte rean viziton.

Tuj granda ŝanĝo fariĝis en nia hejmo. La vizaĝo de la malsanulino, kaj tiuj de la ceteruloj radiis nepriskribeblan ĝojon. Ni ĉiuj, mirigitaj, silente rigardis nin reciproke: kvazaŭ la kompatema Dio estus sendinta al ni tiun bonfaranton. Ŝajnis al ni, ke brila sunradio — longe kovrita de timiga malhela nubo — trafis nian domon, kiu iam estis tre ĝojplena, sed depost tiam longan tempon ĝi jam estis malheliĝinta. La malsanulino ekesperis — kaj ankaŭ ni, la ceteraj.

Kaj efektive la nova kuracilo (nova preparaĵo de **Digitalis**) mirinde efikis dum la unuaj 3—4 tagoj. La malsanulino ekhavis apetiton kaj dormis kelkan tempon pli trankvile. Foje vespere ŝi eĉ kantis ŝatatan de ŝi kanton, kiu rememorigis dolĉan epizodon de nia geĥanĉa vivo. Tiam ŝi ĝoje ekkriis:

— Dio mia, ŝajnas al mi, ke mi estas resaniĝonta!... Kaj mi jam estis tute malesperiĝinta...

La kuracisto vizitis nin ankoraŭ 2—3 fojojn kaj poste diris, ke estas jam nenecese veni tiel ofte.

Sed post 6—7 tagoj la malsanulino subite tre ekmalbonfartis. Tuj ni serĉis la kuracisto, sed en lia hejmo oni diris al mi, ke oni urĝe veturigis lin al proksima urbo, kie li devas resti 2—3 tagojn.

Post du tagoj la malsanulino mortis en terura agonio.

Poste la kuracisto ree vizitis nin.

— Estimata sinjoro M., — ekparolis li tuj post la kutima kondolencesprimo — mi kredas, ke vi jam tute bone komprenis mian ludadon kun la kompatinda malsanulino kaj kun vi mem. Dum nia vere nelonga praktikado en diversaj klinikoj, kaj ankaŭ privataj domoj mi ankoraŭ ne estis vidinta tian disbatitan koron. Ĝi certe estis interesa ekzemplo por studentoj. Jam nenia kuracilo povis helpi. Kaj la ĥirurgio ankaŭ ne donas rimedon laŭ kiu unu koro povus anstataŭi alian, kiel ekzemple unu dento — alian. Dubinde estas, ke ĝi iam atingos ankaŭ tiun sukceson. Do por mi estis restanta alispeca kuracilo, la lasta, kiu tamen ofte bonefikas — la konsolo, la aŭtosugestio. Kaj ĝin mi donis. Mi devis iom dolĉigi al la malfeliĉa suferantino almenaŭ ŝiajn lastajn tagojn.

Ĉiuj homoj naskiĝas sendepende de ilia volo kaj deziro, sed unuj mortas facile, kaj aliaj terure suferas; unuj rapide, per unu fojo eltrinkas la ĉagrenkalikon kaj aliaj — guton post guto dum longa tempo. Enviindaj estas la unuaj, sed ve al la duaj. Centoble provas la suferojn de l'morto tiu, kiu konscie atendas la morton. Ankoraŭ pli bedaŭrinde estas, ke ofte ili malsaniĝas ne pro ilia propra kulpo. Pro kia granda peko devas suferegi tiuj ĉi malfeliĉuloj? Granda enigmo estas la homa vivo!... Al vi mi ankaŭ intence ne malkaŝis la aferon, ĉar alie vi ne povus resti ĝisfine tiel bona kaj gaja, kaj vi ne povus favore influi la malsanulinon per via aspekto. Nun mi opinias, ke ni ambaŭ bone plenumis nian devon. Mia frato, ankaŭ nuntempe via bona amiko, ofte parolis al mi pri vi: plej bonajn rememorojn pri vi li havas de via kunuleco en la gimnazio. En nia domo estas ankaŭ fotografaĵo de vi kiel lernanto.

Mi, kun malsekiĝintaj okuloj, forte premante ambaŭ liajn manojn, respondis:

— Kara kuracisto, mi plej kore vin dankas! Vi estas vere bonfaranto al la suferanta homaro. Restu tia ĝisfine! Sukceseplenan estontecon mi deziras al vi!...

La kuracisto plej kategorie rifuzis akcepti ian honorarion...

Tradukis Ivan H. Krestanov.

KIEL ONI ALMILITAS VIRINOJN.

MAŬRICO JÓKAI.

EL "LITERATURA MONDO"

Sinjorino, vi rifuzas mian fidelan koron jam depost du jaroj: mi ne povas plu elteni la turmentojn; vi ridas je mi kaj mi suferas. Do mi decidis ĉesigi la aferon kaj nun ankoraŭ unufoje, sed laste mi provos paroli serioze kun vi. Vi scias, kiel pasie mi amas vin.

— Mi ne scias, mi jam forgesis.

— Kvankam mi ripetas tion ĉiutage. Vi jam vidis min ploranta antaŭ vi.

— Ho jes! eĉ furiozi. Pri tio atestas rompita tenilo de mia porcelanvazo.

— Nu, kaj kiom mi jam aĉetis anstataŭ ĝiu?

— Sed mi neniam akceptis.

— Ĉar vi volas turmenti min. Sed nun ĉio jam estas finita. Nun mi venis por tio, ke en tiu okazo, se vi ne mildiĝos kontraŭ mi, mi mortigos min ĉi tie antaŭ viaj okuloj.

— Ho! kiomfoje vi diris jam; nur almenaŭ unufoje vi farus.

— Sinjorino, ne ridu je tio! Ne estas tute tiel la afero, kiel vi pensas; nature, se mi prenus pistolon al mia tempio, vi ridus ĉiam ĝis la momento, kiam mi frakasus mian kranion, kaj tiam, kion utilus por mi via bedaŭro kaj kompato. Mi tre dankas. Sed ne tiel estas. Mi mortigos min antaŭ vi per malrapida morto; — pro malsato mi volas morti en via ĉambro. Havu la kruelan ĝojon vidi de horo al horo la mortadon de via plej fidela adoranto!

Post ĉi tiuj vortoj la memmortigonta adoranto sidiĝis sur kanapo kaj firme jejuris, ke de la nuna momento eĉ unu manĝo-peco ne trairos lian gorĝon, nek li eliros la ĉambron.

Clarisse, la bela vidvino, ekridegis je tiu ĉi bizara originaleco kaj ridante lasis la adoranton en sia ĉambro, sciante tute certe, ke en la tempo de l' vespermanĝo li ja forlasos sian lokon. Si mem iris por promeni kaj nur malfruvespere venis hejmen.

La ĉambristino diris al ŝi, ke eĉ nun estas ja ĉi tie tiu sinjoro.

Clarisse nun jam koleriĝis kaj eniris al li.

— Sed sinjoro, ĉu via prudento vere foriris? Ĉu vi volas eĉ dormi ĉi tie?

Clarisse ne volis esti maldelikata, do ŝi mem iris en la najbardomon por dormi, lasante la obstinan adoranton en la ĉambro.

La sekvintan matenon ŝi hejmeniris pensante: eble nun jam finiĝis la malbona ŝerco. La adoranto eĉ nun sidis tie.

— Sinjoro, ĉi tio jam estas impertinento! Vi forpelas min de mia domo; vi donas okazon al la ĉikane por pribabili min, vi faras min tute nerva. Iru for, antaŭ ol mi vere ekkoleras!

—Mi jam diris, ke ĉi tie mi volas morti.

— Ĉu ne prefere en la infero! Estas por vi la Danubo, se vi volas morti; sed iru jam de tie ĉi!

— Ne, ĉi tie mi volas morti.

— Do, jen estas tranĉilo, tranĉu vian kolon, se mortvolo estas tiel nepra!

— Ne, tion mi ne faros.

Clarisse furore kuregis el la ĉambro kaj ŝlosis la pordon. Si estis ja tute certa, ke la malsato forpelos lin!

Ĝis la venonta mateno ŝi eĉ ne pensis pri li. Sed proksimiĝante al la tagmezo ŝi tamen ne povis trankvili. Ĉi tio tamen estas iom troa ŝercaĵo. Si eniris al li. La kavaliro dormeme klinis la kapon sur la kanapkusenon. Jam dum du tagoj li manĝis nenion.

— Sed je la amo de Dio, kara amiko, tiu ĉi estas terura ŝercaĵo de vi! Ne faru stultaĵon! Kion vi volas?

— Sinjorino, mi diris, kion mi volas, — ĝemis li kaj la kapon klinis aliflanken, fermante senfortiĝinte la okulojn.

Clarisse tute ne povis imagi, kion ŝi faru, kiel ŝi rompu tiel teruran obstinecon. La trian tagon — ne povante jam kontraŭstari sian maltrankvilon — ŝi alportis propramane por li tason da supo.

— Nu, kara amiko, ne ŝercu jam, jen estas iom da supo; vidu, mi mem alportis, estu bona, gustumu ĝin!

— Hm! Supo? — ekparolis malŝate la amanto — ĉu mi bezonas supon, kiam mi volas morti?

Kaj vere, li jam apenaŭ povis movi sin, liaj okuloj enprofundiĝis, lia vizaĝo iĝis pala kaj malgrasa kaj en lia rigardo estis io antaŭmorta. Ĉi tiu ja vere volas morti.

Jam alvenis la kvara tago kaj la amanto eĉ nun ne kapitulacis. Estas mirinda sieĝo, kie la okupanta armeo malsatas por kapitulacigi la gvardion de la fortikaĵo.

Clarisse jam preskaŭ malesperis. Tiu homo jam apenaŭ spiretis. Kion ŝi faru al li? Eble li eĉ mortos ĉe ŝi! Kiel terura skandalo estos, se viro mortigos sin per malrapida malsatmorto, kaj ŝi devos vidi tion! Kiel ŝia animo povos elporti tion? Kiel ŝi povas surpreni la scion, ke vidante dum kvar tagoj homon mortadantan pro malsato ŝi ne prezentis al li helpon!

Ŝi ja volonte donus al li kian ajn bonaĵon, sed li ja rifuzas ĉion; li ja ne volas manĝi!

Sed li tamen estas eksterordinare animforta homo, kiu tiel povas agi pro ama malespero. Tio ĉi estas grandioza pruvo de la plej varmega amo! Fine oni ja devas estimi tiun ĉi homon. La morto de tia homo vere estas domaĝo.

— Nu, kara amiko, denove mi alportis por vi la supon. Nu, malfermu la buŝon, permesu enverŝi ĝin!

La malfeliĉa adoranto jam ne povis paroli, faris nur kapsignon, ke li volas nenion.

— Sed do, Dio mia, mi ne volas, ke vi mortu!

La sinmortiganto ektiris la ŝultrojn. Li diris jam antaŭe sian opinion.

Clarisse sidiĝis apud li sur la kanapon kaj kaptis lian manon.

— Estu saĝa, kara amiko, aŭskultu pri la serioza vorto!

La adoranto mildigis sian palan vizaĝon je malĝoja rideto.

— Sed do, mi ja amas vin, nu . . .

Dume Clarisse ĉirkaŭprenis lin kaj por ke ŝi povu malfermi liajn lipojn, — nu, kion fari, — ŝi kisis lin.

Je tio la sinmortigonto kunigis sian lastan forton por rekisi la obstinan kapitulacanton, — sed tuj poste li rapidis senprokraste manĝi la supon.

Ankoraŭ unu tago kaj jam nek supo, nek kiso estus povinta helpi lin.

Dum unu semajno li resaniĝis kaj post du semajnoj ili fariĝis edzo kaj edzino.

Kaj Clarisse neniam devis pripenti, ke ŝi lasis sin konvinki de li. Oni ja ne povas el ĉiu arbetaĵo elsaltigi tian heroismon de amo.

Cetere, mi konfesas sincere, se mi devus elekti tiun ĉi metodon, mi estus sufiĉe saĝa por enpoŝigi kelkajn bulkojn; mi ne scias, ĉu ankaŭ la obstina adoranto ne praktikis la saman artifikon?

El la hungara: Karlo **Bodo**.

LA TESTAMENTO DE TOMEÜ.

De Miquel Roger i Crosa,
el la "Kataluna Antologio"

La melankoliaj frapoj de la sonorilbatilo, ritmaj kaj malrapidaj, falis en la silenton de la vilaĝo, kiel forta pluvego en kvietan lagon. Plenmalfermiĝis fenestroj, malfermiĝis pordoj, kaj, tuje, horo de voĉoj kriegantaj kaj akraj murmuris:

—Kiun oni sakramentas?

—Ĉu vi scias kiun oni sakramentas?

—Eble la avinon de Xico Ros...—

—Ne, malsaĝulino, ja ŝi estas tute resaniĝinta! ĝuste hodiaŭ ŝi manĝis teleron da supo.—

—Ja kiom da fojoj piedfrapis la morton ĉi tiu maljunulino!—

Okaze preterpasis sinjoro kuracisto, rekte tien kie tia babilado resonis, kaj tiam, kompreneble, la scivolemaj okuloj de la kritikemaj virinoj brilis de kontento.

—Oportune vi alvenis, sinjoro Jozefo. Ĉu estas eble scii, kiun oni sakramentas?—

Sinjoro kuracisto, kiu vojiris priokupata kaj meditema, rapide haltis, rigardis serioze ĉiujn stratoflankojn por kapti per la rigardo tiom kaj tiom da kapetoj elmontriĝintaj el la fenestroj, kaj ŝultrokuntirigante, respondis:

—Ja, mi scias nenion.

Se liaj mensokupoj ne estus estintaj tiel profundaj, nek la sciencaj pripensoj tiel regantaj lian spiriton, sinjoro kuracisto, certe, estus aŭdinta la litanion da mokoj per kiuj insultis lin la babilemaj virinoj.

—Kia malplaĉa kaj malafabla homo!

—Ĉar eble li estas kulpa je tiu mortmalsano... pro tio li ne malfermas la buŝon.

—Kiel ruza estas tiu viglulo! Neniam paroli, jen taŭga maniero ne sin kompromiti.

Ankoraŭ daŭris la ironia litanio, kiam la bigotaj virinoj de la vilaĝo, elirinte el ĉie, sin direktis al la preĝejo, facilmove kaj rapidege.

Tuj kiam ili maltrankvile, nerve estis forlasintaj la hejmokupojn, ekresonis en la kvieta aero la malgajaj sonorilbatadoj, kaj multaj el ili, pro sia dezirego profiti la tempon, surmetis sur sin la mantilon, ĉe la strato, dum vojirado.

—He, Mari-Agno.

—Aŭskultu, sinjorino Ronjo, ĉu vi scias kiun oni sakramentas?—ripetis la horo de kritikemulinoj.

—Ha, filineto, mi ja tion ne scias.

La kritikemulinoj estis pravaj. Estis strange, ke en trankvila vilaĝo kiel Aulí, sinjoro kuracisto, la bigotulinoj, la kritikemulinoj ne estus sciintaj kiu estas la animo petanta religian helpon. Kaj estis kurioze vidi kiel la bigotaj virinoj, en la preĝejo, dum la akvopreno, dum la surgenuiĝo, demandis unuj la aliajn:

—Ĉu vi scias kiun oni sakramentas?

La religia sekvantaro eliris al strato je la horo kiam la subiranta suno iĝas brila kiel oro kaj purpuro. La brilegaj radioj malheligis la lumecon de la kandeloj. Kortuŝita de la beleco de tiu lumo, la animo ne povis pripensi pri dolora danĝerokazo: pli bone ĝi imagis spektaklon de la Kristkorpo festo, kun himnoj de laŭdado kaj pompoj de gloro, kun muzikoj de kvieta religieco, kun odoro de stipfloroj kaj flirtflugado de multkoloraj damaskoj.

La religia sekvantaro, flankenlasinte la straton "Major", sin direktis al la maro.

La bigotulinoj rigardis sin mirigite, scivoleme. Grave kantis la pastro, sed lian plenan voĉon, lian tondran voĉon, de tempo al tempo superregis la akraj notoj de sonorileto.

Jus ekvidinte la maron, la ŝipon ankrumitan en la golfeto, kaj du boatojn albordiĝintajn ĉe la sablaro, kiel du birdoj en ripozo, ĉiuj virinoj spiris plaĉe kvazaŭ en tiu momento ili liberiĝus el forta subpremo.

—Ja, mi ne sciis, ke en la ŝipo estas malsanuloj.

—Kaj estas la franco, ĉu vere?

Sed alveninte ĉe la bordo de l' akvo, la paroĥestro sin turnis al la amaso de la fideluloj, kaj mallaŭte diris:

—Ni devas iri al la golfeto "Mirajosa" sakramenti la maljunan Tomeu.

La surprizo elŝiris sopiron el ĉiuj koroj. Hezito ekmontriĝis en multaj rigardoj. De Aulí al "Mirajosa" oni bezonas tutan unu horon, tra la maro, kaj eĉ tian, forte kaj rapide remante. La maljunulinoj plej kadukaj kaj malfortaj, kiuj, kun bedaŭro, ne povis akompani Nian Sinjoron, murmuris:

—Ni, certe, ne povas tien iri.

Kaj dum ili tion diris, la pastrohelpanto kun la pluvombrelo, la akolitoj kun grandaj lanternoj, kvin aŭ ses viroj kaj la junaj kaj kuraĝaj virinoj, saltis sur la boatojn, kiuj reflektis brilon de polurajoj.

La du boatoj pleniĝis de punktoj lumaj kaj facilmovaj, kiuj duonelvaporiĝis en la radioŝprucado de la brilanta suno, en la granda amaso da blindiga lumo.

La originaleco de tiu sankta procesio superŝutis la animojn de nova ne konata sento, kaj de rava emocio kies plej bela elmontro estis silento. Kia silento! La komerca vivo haltis kiel haltas la batado de koro antaŭ grandeco de imponanta okazantaĵo. La havenlaboristoj, blasfemaj kaj kriemaj, surprizitaj, mirigitaj, restis senmove, kun la ĉapo inter siaj maldelikataj manoj, kun la kapo klinita.

La maristoj kondukantaj la ŝipojn remis timeme, kun singardo, ĉar ili timis disverŝi ŝprucojn kaj akverojn malgraŭ tio ke ondomovado ne vidiĝis en la glata surfaco de la maro.

Kantis la pastro solene kaj lian tondran voĉon de tempo al tempo superregis la akraj notoj de sonorileto.

Ĉe la ekstremo de la haveno, kankaptisto de fiŝoj ne sciis kian sintenon alpreni, kaj liaj okuloj montrantaj malspritecon vagis ĉien, je ĉiuj flankoj, kvazaŭ kaptitaj de fantazia vizio.

La du boatoj, rapidglitantaj kiel paro de cignoj, desegnis sur la olea surfaco, du longajn postsignojn similantajn sulkojn de vojo tre larĝa.

En tiu preciza momento, fendante la orajn akverojn flosantajn en la aero, flugilbatis mevo preskaŭ tuŝante la atlasan pluvombrelon. Ĉiuj virinoj ekkriis, sed la mevo, rapide flugilbatante, malaperis.

La vilaĝo ricevis, en tiu horo, plenan kisadon de la suno. Ĝiaj vitroj estis blindigaj, ĝiaj domoj ehrigardis kiel brila neĝblanko. Altiritaj de tiu brilo, la bigotaj virinoj direktis al ili siajn rigardojn, malgraŭ la vundoj el ili ricevataj. Estas tiel

alloge revidi kaj koni, de la maro, de longa distanco, la vicon da domoj de la naskiĝvilaĝo! Ĉe la ekstremo de la linio, en la marbordo, ĉiu el ili vidis ankoraŭ la figurojn de la malfeliĉaj, kadukaj maljunulinoj, senmovaj kiel statuoj.

Ĉe la tagmezo, eliris el la fundo de la maro la sono de sonorilo malrapide balanciĝanta, kiu similis, en tiu soleco, ĝemojn de kortuŝanta plendo.

—Estas la funebra sonorilo, diris la akolito de la sonorileto kun sinteno ektimigita kvazaŭ li ekliberiĝus de fantazia sonĝo.

Kaj de tiam, kvazaŭ la knabeto estus doninta plian solenecon al la sono eliranta el la akvoj, li ĉesis sonorigi.

—Kiel bela estas ĉio ĉi!

—Mi estas tute emociiĝinta—diris mallaŭte la virinoj inter si.

Kaj admirante ĉiuj la spektaklon kiun prezentis la kvieta maro, kun ĝia bela franĝo el lumaj punktoj, la mildeco de la aero kaj la flugado de la mevoj, ili ĉesis konsideri la doloran staton de la maljuna Tomeu, de tiu malfeliĉa maristo al kiu la sama maro forrabis lian edzinon kaj lian filon dum tago de furiozo kaj malamo.

Malfeliĉa, maljuna Tomeu! Kiel asketo, li rifuĝis de post sia malfeliĉo, ĉe la Mirajosa, golfeto nealirebla de la vilaĝanoj. Kaj tie li vivis solece, kun sia doloro, same kiel Artamanto, pri kiu parolas al ni Sofoklo.

Kelkaj fiŝkaptistoj, kiam ili renkontiĝis kun la procesio, mallevis rapide la velojn, kvazaŭ ili estus mallevintaj flugilojn, kaj religie, malkovrante la kapon, ili surgenuiĝis. La emocio pro la ĉeesto de Nia Sinjoro en ilia kampo de batalo kaj de laboro, en la loko, de kie tiom kaj tiom da fojoj, dum terurigaj noktoj, dum klaraj tagoj ili preĝis al Li, envolvis ilin de kortuŝeco.

"Savu nin, ho sinjoro, de la furiozoj de la akvoj, de la perfido de ĉi tiu maro, de la frapegoj de la ventoj!"

Ĉiuj bigotulinoj, senescepte, estis altiritaj, en tiu momento, de la avideco preĝi.

La boatoj, flankon ĉe flanko, interniĝis en la golfeton "Mirajosa". La maro estis vera spegulo. Ĝi reflektis la nigrecon de la rokaro. La ŝtonegoj montris pendornamaĵojn el beraroj. En kavaĵo ŝajnis ke smeraldo kuŝas.

Post albordigo de la du boatoj, la sekvantaro malsupreniris silente, fiksante la rigardon sur la kabaneton konstruitan inter la rokoj de la malfeliĉa Tomeu.

La tuta marbordo tapiŝita de ŝtonetoj kaj sablo, grincis kiel metala vibrado. La lumetoj de la kandeloj, fortikiĝinte pro la vesperiĝo, elrigardis kiel koboldaj flametoj vagantaj tra la marbordo.

En la kabano de la maristo ne sole eniris sinjoro parohestro kaj helpantoj: la plej kritikemaj virinoj incitataj de forta scivolemo, ankaŭ eniris en la maldelikatan ĉambron, kies tegmento estis konstruita el pinbranĉoj kaj faskoj de lignaĵoj. La lumo pala kaj mortanta trapenetris tien, heligante makabre la kadavran vizaĝon de la mortanta maljunulo.

La virinoj pene genuiĝis. Incitataj de la stranga aspekto de la maldelikata kabano, ili rigardis ĉion, esploris ĉiujn angulojn, konjektis pri la du portretoj pendantaj apud la lito, ĉe ambaŭ flankoj de pia figuro. Ĉiu el ili komprenis la maldolĉajn rememorojn de multaj objektoj. La malgajo de tiuj restaĵoj kantantaj la detruadon de feliĉa hejmo, aperis nuda kaj kruela antaŭ la rigardo de la virinoj. Kaj granda kompato moligis iliajn korojn.

En la kvieta kaj milda golfeto, adorinda restadejo, komforta nesto oferdonita de la naturo al la homo, resonis "Te Deum". Kaj tiu himno de laŭdado disvastiĝis sur la maron kaj disverŝis ĉe la marbordan arbaron sian dian parfumon.

La du boatoj, tiam tre bone lumigitaj, glitis sur la trankvilaj kaj dormantaj akvoj. La steloj tremoviĝis. Ĉe okcidento oni vidis ankoraŭ finiĝon de la ĵus mortinta ondo.

La kanto de la pastro kaj la sono de la sonorileto, en tiu vespera silento, havis imponan severecon.

Sub la impreso de malgaja morto, oni ektimis trairi la misteran abismon kaj la randon de abrupta rokaro eniganta siajn radikojn en tiun abismon.

La animoj, kortuŝitaj kaj pentintaj, kompatis tiun malfeliĉan homon kiu mortis en mizero kaj soleco. Sed tiuj el la vilaĝo, kiuj ne ĉeestis tian funebran spektaklon, sciinte la morton de Tomeu, montris kruelan indiferentecon.

—Mi pensis ja ke li mortis!

—Multajn jarojn da avantaĝo!

—Li estis homo tre stranga!

Sed kiam la sciigo, ke Tomeu lasis tutan sian havaĵon al la mizeruloj de la vilaĝo disvastiĝis rapidege, tiam la vilaĝo, kiel dismovita lago, kiel avarulo ekvidinte la brilon de l' arĝento, kiel militistaro tuj disdononta inter si la aviditan akiraĵon, entuziasmiĝinte freneze, honoris tre laŭte la memoron de l' mortinto.

—Li estis bona viro!

—Koro de anĝelo!

—Li suferis multe, malfeliĉulo, en ĉi tiu mondo, kaj li volis lasi konsolon al la mizeruloj.

—Ke Dio lin pagu per ĉiela gloro!

—Ni, mizeruloj, eterne benos lian rememoron.

Kaj kiam la loĝantaro eksciis, ke sinjoro parohestro estas la disdononto de la monheredaĵo, ĝi alkuris al la paroĥo, en senfina procesio, plorema kaj peteganta.

Sinjoro parohestro, ekvidinte tian longan vicon, restis terurplena, ĉar liaj kalkuloj pligrandigontaj longatempe la monheredaĵon por favoro kaj profito de la mizeruloj, rezultis ja eraraj.

Ĉiu estis senhava. Ĉiu rakontis bedaŭrojn kaj mizerojn. Ĉiu vivis malriĉe.

—Ne povas esti,—al si diris sinjoro parohestro;—la vilaĝanoj multe laboradas, mangas bone kaj amuziĝas pli bone. Oni ne trovas virinon por lavi la litotukojn de la hospitalo.

Sed kiel ajn estis, post la senfina litanio de plendoj kaj malfeliĉoj, la testamentaĵo de Tomeu forflugis kaj malaperis kun nekredebla rapideco.

Tamen por honoro de la vilaĝo oni diru—kaj tio estas certa,—ke la enterigon kaj funebran ceremonion de tiu, kiu en la mondo estis soleca animo, ĉeestis grandega homamaso, tiel ke ĉiuj buŝoj kun malofta kunmikso de malĝojo kaj ĝojo, murmuris:

—Laŭ mia rememoro, neniam mi vidis demonstracion tiel imponantan.

Trad. Isidre Torrents.

TRA LA ĈIELO KAJ LA INFERO

Dr Viriato Correia
EL "BRAZILA ESPERANTISTO"

Foje, estis jam tre malfrue, kaj la skriblaboradoĉe la ĉiela pordego jus finiĝis. Sankta Petro, kun granda ligajo de ŝlosiloj, ekriglis la ĉielajn pordojn de l' Paradizo.

Estis jam fermita unu el la pordoj, kiam delikate sonis, el ekstere, la bruo farita de fingroj diskrete frapintaj.

La maljuna ŝlosilgardisto, tra la pordo, eligis la kapon:

—Kio estas, kamarado?

Estis viro ankoraŭ juna, kies tre freŝa vizaĝo montris melankoliajn okulojn, kvazaŭ li sopirus je la tero.

—Vi volas eniri, ĉu ne? demandis Sankta Petro. Ĉiutage okazas la samo, oni alvenas ĉiam lasthore, ĉe la laborĉesigo.

—Sed mi mortis antaŭ nelonge, kaj la vojo estas longa.

—Longa! Tamen pro tiaj aferoj la ĝenata estas mi. Eniru, kaj atendu apud la pordo, dum mi ekzamenas la registrolibrojn.

Kio estas via nomo?

—Manuelo Jozefo de Silva.

—El kie?

—El Rivero Klara.

—Ĉu vi mortis hodiaŭ?

—Mi mortis hodiaŭ.

La maljuna pordisto prenis el la breto la libron de la tago, kaj surmetis la okulvitrojn.

—Manuelo... Manuelo... Manuelo...

—Jozefo de Silva, diris la mortinto.

—Manuelo... Manuelo... Manuelo... kaj li tralegis ĉiujn foliojn.

—Via nomo ne troviĝas tie ĉi. Hodiaŭ ne estas plu loko por la Manuelo, ĉiuj jam ĉeestas. Foriru tuj. Mi volas fermi la pordojn. Via loko estas en la infero.

Kion fari, se oni ne povas, post la morto, resti senŝirme, sub libera ĉielo, sen tegmento, elpelite?

Kion fari?

La malfeliĉa mortinto malgaje lasis la ĉielon, kaj vojiris al la infero.

En la infero, neniam ĉesas la laboro. Tage kaj nokte, pordisto atendas la gastojn. Estas pli da ĝentileco ol en la ĉielo. Alvenante, oni ne trovas iun Sanktan Petron malrapideme riglante la pordojn. La akcepto ĉiam afabla, ridema, vigla.

—Senceremonie, sinjoro, bonvolu eniri, estu kiel ĉe vi.

Kiam nia mortinto alvenis, ĉe la pordo estis granda amaso, kaj li estis devigata atendi ĝis kiam ĉiuj eniris, kaj fine venis lia vico.

—Manuelo Jozefo de Silva, el Rivero Klara; mi mortis hodiaŭ.

En la infero la librotenado estas mirinde organizita. Dum malpli ol kvaronhoro, oni povas koni la tutan doman movadon.

Ne malfacile la demono senesperigis lin:

—En la libroj ne estas registrita via nomo. Vi apartenas al la ĉielo.

—Ĝuste el tie mi venis. Ankaŭ tie ne troviĝas mia nomo.

Eksterordinara afero!

La demono pensis pri skriberaro, kaj sin jetis al la libraro, tralegante paĝojn, foliumante paperojn.

—Neeble, via nomo ne estas ĉi tie, sed en la ĉielo.

—Tamen mi iris tien, kaj Sankta Petro ĝin ne trovis.

—Vi obstinadas pri Sankta Petro, kiu jam estas maljuna, kaduka, kaj ne plu taŭgas por tiu ofico. Verdire, oni malmulte laboras en la ĉielo, ĉar tien iras maloftulo; malgraŭ tio, bezona estas iom da zorgo.

—Li tralegis la librojn kaj ne trovis. Jus finiĝis la taglaborado.

—Li tralegis nenion. En la ĉielo ekzistas aliaj registrolibroj. La librotenado estas malordigita. Sankta Petro malordegigis ĉion. Eble li ne zorge serĉis. Certe Sankta Petro, rapidante kun la deziro enlitiĝi, fuŝe ekzamenis la librojn! Tio malprosperas! Tie ĉi mi povas certigi ke ne estas via nomo. Mia kara sinjoro, iru al la ĉielo, via loko estas tie.

—Sed la laborado jam finiĝis, la pordoj estas rigliitaj.

—Frapu; ne estu stulta, frapadu. Se vi mortis hodiaŭ, vi devas eniri hodiaŭ. Tia estas la leĝo. Sur la strato vi ne povas resti. Atentu, mi ne proponas al vi liton ĉe ni tial,ke ni ĉesigis niajn rilatojn kun la ĉielo, kaj pro motivoj de ordo kaj honoro, ni ne gastigas la ĉielanojn. Vi ne povas resti senkovre, senlite. Iru, frapadu la pordon, bruegu, perforte malfermu ĝin.

La mortinto fine decidis reveni al la Paradizo.

Kia klopodo! La pordego preskaŭ falis. Fine aperis Sankta Petro, dormetema, kolera, frotante la okulojn.

—Nu, mi jam diris.ke vi ne apartenas al ĉi tiu ejo?

—Tamen ankaŭ al la infero mi ne apartenas. Oni ne trovis mian nomon tie.

—Nek ĉi tie. Mi jam ripetis tion al vi.

—Faru al mi la komplezon denove ekzameni. Eble okazis eraro.

—Ĉu mi estas malsaĝulo? Mi jam diris al vi ke ne.

La mortinto daŭrigis sian insistadon kaj Sankta Petro cedis, ekrelegis la registrojn:

—Manuelo Jozefo de Silva, el Rivero Klara, ĉu ne?

—Jes, via sinjora moŝto.

—Ĉu vi mortis hodiaŭ?

—Jes, mi estis operaciita de la kuracisto Baeta.

Sankta Petro frapis la frunton.

—Vi estis operaciita de la kuracisto Baeta?

—Jes, sinjoro.

—Jen la afero!

Kaj li ree foliumis la paperkolekton.

—Estas ĉi tie, via nomo estas ĉi tie. Vi estis mortonta post dek-kvin jaroj de hodiaŭ. Sed doktoro Baeta kuracis vin, kaj vi mortis pli frue. Kial vi ne tion diris tuj? Pro tiu ĉi fakto, vian nomon ne enhavas la hodiaŭa registrolibro. Vi devus morti nur post 15 jaroj. Eniru.

Tradukis A. Caetano Coutinho.

JUNKMANTELO.

EMMA L. OSMOND.

EL "LITERATURA MONDO"

Iam vivis riĉa sinjoro kiu havis tri filinojn, kaj li deziris scii, kiom ili lin amas. Do li demandis la plej aĝan:

— Kiom vi min amas, kara mia?

— Tiom, kiom mi amas la vivon — ŝi respondis.

— Bone, — diris li — kaj kiom vi min amas, kara mia — li demandis la duan.

— Pli ol mi amas ĉion en la mondo.

— Bonege — li diris.

Tiam li demandis la trian:

— Kiom vi min amas, kara mia?

— Mia amas vin tiom, kiom la freŝa viando amas la salon.

Tiam li tre koleriĝis.

— Vi tute ne amas min — li diris. — For el mia domo, tuj!

Do, li elpelis ŝin, kaj fermis la pordon al ŝi.

Ŝi foriris, kaj promenis ĝis ŝi alvenis marĉon. Tie ŝi kolektis junkojn kaj faris mantelon kiu kovris ŝin de kapo ĝis piedo, tutkaŝante ŝiam belan vestaĵon. Poste, ŝi promenis ĝis ŝi alvenis al granda domego.

— Ĉu vi bezonas servistinon — ŝi demandis.

— Ja ne! — ili respondis.

— Sed mi ne havas hejmon — diris ŝi. — Mi faros ĉian laboron senpage.

— Nu, — ili diris, — se plaĉos al vi lavi la manĝilaron kaj purigi la vazojn, ni permesos al vi resti.

Do, ŝi restis kaj lavis la manĝilaron kaj purigis la vazojn, kaj faris ĉian laboron. Ŝi ne diris sian nomon, do ili ŝin nomis Junkmantelo.

Unu vesperon, ĉe proksima domego, okazis granda balo, kaj la servistinoj iris por vidi la genobelojn. Junkmantelo diris, ke ŝi estas tro laca kaj deziras resti hejme. Sed tuj post ilia foriro, ŝi demetis la junkan mantelon, purigis ŝin kaj iris al la balo, kaj ŝi estis la plej bela el ĉiuj.

Nu, la filo de ŝia mastro ĉeestis kaj dancis nur kun ŝi. Antaŭ la fino de la balo junkmantelo subite malaperis, hejmeniris. Kaj kiam la aliaj revenis, ŝi ŝajne dormis.

Proksiman matenon ili diris al ŝi:

— Ho, Junkmantelo, vi ja estas malbonŝanca! Kia bela vidindaĵo ĝi estis!

— Kio estis?

— La plej bela iam vidita sinjorino, tute belege vestita. La juna mastro rigardis nur ŝin dum la tuta tempo.

— Mi treege deziras vidi ŝin — diris Junkmantelo.

— Vespere okazos alia balo; eble ŝi ĉeestos.

Sed vespere Junkmantelo denove diris, ke ŝi estas tro laca iri tien. Tamen tuj post ilia foriro, ŝi demetis la junkan mantelon, purigis ŝin kaj iris al la balo.

La mastra filo tre ĝoje revidis ŝin kaj tuttempe rigardante ŝin, dancis nur kun ŝi.

Antaŭ la fino de la balo ŝi ree malaperis, kaj, vestita en la junka mantelo, ŝi ŝajnigis dormi kiam la aliaj revenis.

Proksiman tagon, ili denove diris:

— Ho, Junkmantelo! Vi devus esti ĉeestinta por vidi la belan sinjorinon. Tie ŝi estis, brile kaj bele vestita, kaj la juna mastro neniam ĉesis rigardi ŝin.

— Nu, — ŝi diris — certe plaĉus al mi ŝin vidi.

— Vespere okazos tria balo, kaj vi devas iri kun ni, ŝi nepre ĉeestos.

Ree ŝi diris, ke ŝi estas tro laca, kaj malgraŭ iliaj penadoj, ŝi restis hejme. Sed tuj kiam ili foriris, ŝi faris same kiel antaŭe. La mastra filo tre ĝoje ŝin vidis kaj dancis nur kun ŝi. Kiam ŝi rifuzis diri sian nomon kaj loĝejon, li donis al ŝi ringon, dirante, ke li mortos se li ne revidas ŝin.

Antaŭ la fino de la balo ŝi faris same kiel antaŭe, kaj ŝajne dormis kiam la aliaj revenis.

Proksiman tagon ili diris:

— Ho, Junkmantelo! Vi ne venis hieraŭ kaj vi ne povos vidi la sinjorinon, ĉar ili ne plu dancos.

— Mi treege deziras, ke mi vidu ŝin — ŝi diris.

La mastra filo ĉiel penis eltrovi, kien la sinjorino iris, sed malgraŭ siaj ĉieaj serĉoj kaj demandoj li nenion aŭdis pri ŝi. Li pli kaj pli amis ŝin ĝis li tiel malsaniĝis, ke li jam ne povis ellitiĝi.

— Faru kaĉon por la juna mastro, — oni diris al la kuristino — li mortas pro amo al la sinjorino.

La kuiristino komencis ĝin fari, jus kiam Junkmantelo eniris.

— Kion vi faras? — ŝi demandis.

— Mi kuiras kaĉon por la juna mastro, li mortas pro amo al la bela sinjorino.

— Permesu, ke mi faru ĝin — ŝi petis.

Unue la kuiristino rifuzis, sed poste ŝi konsentis, kaj Junkmantelo faris la kaĉon. Kiam ĝi estis preta, ŝi kaŝe enmetis la ringon antaŭ ol la kuiristino portis ĝin al la juna mastro. Li ĝin manĝis kaj ekvidis la ringon.

— Kiu faris la kaĉon? — li demandis.

— Mi — respondis la kuiristino tre timigita.

Li rigardis ŝin kaj diris:

— Ne, ne vi tion faris. Diru, kiu tion faris, kaj nenio malutilos vin.

— Estis Junkmantelo.

— Sendu ŝin al mi.

— Ĉu vi faris la kaĉon?

— Jes, ja! — ŝi respondis.

— De kiu vi ricevis tiun ĉi ringon?

— De tiu, kiu donis ĝin al mi — ŝi diris.

— Kiu do vi estas?

— Mi montros al vi.

Kaj ŝi demetis sian junkmantelon kaj tie ŝi staris en sia bela vestaĵo.

Nu, la majstra filo rapide resaniĝis kaj post nelonge la edziĝo estis aranĝata. Ĉiuj, proksime kaj malproksime, estis invititaj, inter ili la patro de Junkmantelo, sed ŝi ne diris al li kiu ŝi estas. Antaŭ la edziĝfesto ŝi diris al la kuiristino:

— Pretigu ĉian manĝaĵon sen eĉ unu ero da salo.

— Tio estos treege aĉa — diris la kuiristino.

— Tute ne gravas — respondis Junkmantelo.

La edziĝtago alvenis, kaj post la edziĝo la gastaro altabliĝis por manĝi.

Kiam ili ekmanĝis la viandon, ĝi ŝajnis tre sengusta. La patro de Junkmantelo provis unu pecon post la alia, kaj fine ekploris.

— Kio okazis? — demandis la mastra filo.

— Ho ve! — li respondis — iam mi havis filinon kaj mi demandis ŝin kiom ŝi min amas; ŝi respondis: "Tiom, kiom la freŝa viando amas la salon."

Sed mi opiniis, ke ŝi ne amis min, kaj mi elpelis ŝin el mia domo. Nun mi komprenas, ke ŝi amis min pli ol la aliaj. Kaj eble ŝi estas mortinta.

— Ne, patro, jen mi estas — diris Junkmantelo.

Kaj ŝi iris kaj enbrakigis lin. Poste ili ĉiuj vivis feliĉe.

LUMIGILO DE FELIĈO.

De J. Biliŭnas.

El la "Litova Almanako"

Sur alta kruta monto aperis mirinda lumigilo. Ĝi brilis, kiel stelo, ĉirkaŭlumigita per hela rondo, el oraj literoj. Ĝin ekvidinte homoj iris al la monto, miris je lumigilo, sed nepovante surgrimpi la monton, ne povis ankaŭ tralegi la orajn literojn.

Fine troviĝis junulo, kiu tralegis al la kolektiĝinta homamaso: "Feliĉo de la homoj."

Famo pri tio disvastiĝis en la tuta ĉirkaŭaĵo: ĉie sole nur pri tio oni parolis. Sed neniu povis bone kompreni, kaj al aliaj klarigi, kion signifas tiuj vortoj. Dum tutaj tagoj kaj noktoj homamasoj deĵoris apud la monto, unuj forirante, aliaj alvenante, kaj atendis novan, ankoraŭ pli grandan miraklon, aŭ klarigon de la malnova...

Kaj la lumigilo ne nur ne estingiĝis, sed ĉiam pli lumis kaj la oraj literoj ĉiam pli brilis...

Kaj unu nokton venis al tiuj homoj griza maljunulo, kaj demandis ilin:

— Por kio vi tien ĉi kolektiĝis kaj kion vi atendas?

La amaso respondis:

— Jen, sur la monto aperis lumigilo kun mirinda surskribo, kiun ni ne komprenas.

— Mi al vi klarigos, — respondis la maljunulo: — tiu ĉi lumigilo estas ja via feliĉo; tiu, kiu surgrimpos la monton kaj ektuŝos lumigilon, li ĉiujn homojn faros feliĉaj...

Ekĝojis la amaso kaj ekmoviĝis kiel maro. Kvankam la monto estis alta kaj kruta, tamen plenegaj je ĝojo homaj okuloj rigardis ĝian pinton, kiel sunon, kaj multaj jam sin preparis por grimpi.

— Haltu, mi ankoraŭ ne finis! Ne tiel estas facile, kiel vi opinias, atingi la pinton de la monto; tiujn, kiuj grimpos, de ĉiuflanke timigos abomenegaj fantomoj, krios kaj ĝembojos per diversaj voĉoj, vokos ilin returnen. Kaj tiuj, kiuj ektimos, sin returninte ekrigardos malsupren, aŭ pro nesingardemo deglitos iliaj piedoj, momente aliiĝos je ŝtonoj. Kaj eĉ tiuj, kiuj surgrimpos poste la monton kaj ektuŝos la mirindan lumigilon, tuj aliiĝos je ŝtonoj kaj nur per sia morto faros aliajn feliĉaj...

Tiel dirinte, la maljunulo malaperis.

Ekmalĝojis la amaso, aŭdinte tiujn liajn vortojn; ekspiris la tuta amaso kiel unu homo, kaj malalten ekklinis siajn kapojn. En iliaj okuloj estis jam ne ĝojo, sed disreviĝo; nun ili ne proksimiĝis al la monto, sed komencis de ĝi malproksimiĝi... Neniu volis oferi sian vivon. Kaj ne nur sian vivon ne volis oferi, ankaŭ aliajn de tio admonadis. Gepatroj bedaŭris siajn infanojn, junulinoj siajn junulojn, junuloj siajn amatinojn, fratinoj fratojn: unuj gardis la aliajn, tremis unu pri la alia.

Tamen troviĝis kuraĝuloj. Ne multe da tiaj estis, sed ilia nombro ĉiam kreskis.

Gefiloj kaŝe de ĉiuj forkuradis el gepatraj domoj, tre malofte benataj de ili; enamiĝintaj gejunuloj disiĝadis, unuj riproĉante la aliajn, kaj nur malofte iuj iris kun forte kunplektitaj manoj. Kaj iris tiuj ĉi ĉiuj kuraĝuloj al la monto por oferi sian vivon por feliĉo de la homoj, forgesante sin mem, siajn amatojn...

Malfacila estis ilia vojo. La monto estis tiel kruta kaj glita, ke sufiĉas la plej malgranda nesingardemo, kaj la malfeliĉuloj glitis malsupren kaj aliiĝis je ŝtonoj. Kaj diversaj fantomoj, kvazaŭ spiritoj de infero flugadis ĉirkaŭe, kiel teruraj neekzistantaj bestoj timigadis de ĉiuflanke, ĝembojis kiel lupoj, siblis kiel serpentoj, bojis kiel hundoj. Pro diversaj voĉoj kaj terurajoj al la kuraĝuloj fariĝadis kapturniĝo, suferis la korpo, kaj malfortiĝinte ili faladis malsupren, aliiĝante je ŝtonoj.

Sed anstataŭante la pereintojn iris novaj amasoj da kuraĝuloj kaj grimpis sur la monto. La tutan montbazon ĉirkaŭis alta ŝtona muro: tiu ja estis kadavroj de la pereintoj.

La loĝantaro nun malproksimiĝis de tiu monto, kiel de la plej terura malsano kaj pesto. Kaj tiuj, al kiuj tie pereis karaj homoj, — al gepatroj infanoj, al junulinoj junuloj, al junuloj iliaj amatinoj, forŝirante la harojn de siaj kapoj kaj versante la larmojn, malbenis tiun lumigilon, dronante en malfeliĉegoj... La monto fariĝis la plej terura loko de malfeliĉoj kaj malbenoj.

Tamen tio ne detenis la novajn amasojn da kuraĝuloj de la oferoj kaj sindediĉoj. La spiritoj de la pereintaj kolegoj naskis en iliaj koroj neprirakonteblan mirindan eblecon: ili necedante iris al la monto unu post la alia.

El la homaj kadavroj, aliiĝintaj je ŝtonoj, ĉirkaŭ la malnova monto fariĝis alia monto, kies pinto ĉiufoje pli kaj pli proksimiĝis al la lumigilo. Al la pli lastaj amasoj da kuraĝuloj ĉiam estis pli facile supreniri...

Kvankam jam pli ol unu jaro da oferoj kaj sindediĉoj pasis, kaj tamen ankoraŭ nek unu el la suprenirantoj aproksimiĝis al la monta pinto, ektuŝis la mirindan lumigilon. La loĝantaro de la ĉirkaŭaĵo nomis ilin jen revuloj kaj frenezuloj, jen ploris ilin bedaŭrante; multe ankoraŭ estis da tiaj, kiuj je ili nur ridis, mokis kaj ĝojis, ke ili pereas.

Sed, jen, unu belan printempan tagon sennombra amaso da kuraĝuloj — gejunuloj, infanoj kaj maturaj viroj, palaj kaj lacaj — denove aproksimiĝis al la monto. En la okulojo de ili ĉiuj lumis espero kaj kuraĝo, amo kaj sindediĉo. Ekkriegis ĉiuj per voĉo kaj, kiel ondoj de ekmoviĝinta maro, sin jetis al la monto, deĉiuflanke timigataj kaj persekutataj de fantomoj, ili grimpis kaj grimpis trans la ŝtonaro supren, surkovrante la tutan vojon per novaj kadavroj de siaj pereintaj kolegoj. Ju pli supren ili grimpis, des pli maldensa fariĝis ilia nombro. Jen jam nur iomete da ili restis. Sed ili jam tre, tre proksime estis de la pinto. Aŭdis ili jam nek kriegon de fantomoj, nek vidis iliajn terurajn vizaĝojn; iliaj brilantaj okuloj estis streĉitaj al la lumigilo, kaj de ĝi ili ne povis jam sin detiri, tio ja estis fino de ilia

malfacila vojo, tie ja feliĉo de la homoj staris antaŭ iliaj okuloj...

Ankoraŭ du, tri kolegoj falis kaj la restintaj atingis la pinton... Ekkriis ili per la ĝojega potenca voĉo de la venko, kaj ĉiuj, kiel unu ekkaptis per siaj manoj la lumigilon. Ĉiuj unumomente aliiĝis je ŝtonoj...

Kaj fariĝis mirakle! Ĉiuj fantomoj malaperis, kaj la ektuŝita lumigilo dispeciĝis je sennombra multego da lumigiletoj, kaj, kiel falantaj steloj de la ĉielo, deiĝis de la monto malsupren eklumigante la tutan ĉirkaŭaĵon. La homoj de tiu ĉirkaŭaĵo subite eksentis en siaj kampoj, domoj kaj loĝejoj agrablan lumon, en siaj koroj kaj kapoj neprirakonteblan kvietecon. Momente dispeciĝis katenoj de la mallibereco, malaperis inter la homoj malamo kaj diversaj ofendoj kaj maljusteco; ĉiuj sin eksentis estantaj egalaj kaj feliĉaj, ĉiuj estimis la proksimulon kaj liajn rajtojn.

Aperis feliĉo inter la homoj...

Ekvidinte sin kaj aliajn tiel aliiĝintajn, la homoj divenis ankaŭ la kaŭzon de la ŝanĝo. Rememoris ili la mirindan lumigilon, kaj ĉiuj, kiel unu, kuris al la malbenita monto por ekrigardi. Sed kolektiĝintaj homamasoj jam ne trovis la lumigilon. Eĉ la malnova monto jam ne estis videbla: ĝi tuta estis, de la malsupro ĝis la pinto mem ĉirkaŭita per ŝtonaro.

Ĉion komprenis nun la homoj kaj kun respekto humile ekklinis siajn kapojn teren; tio ja estis la kadavroj de iliaj savintoj, kiuj, mem mortante, alportis al ili la feliĉon...

Kaj de tiu tago la antaŭe malbenita monto estis nomita loko de gloro kaj feliĉo; de tiu tago ĝi fariĝis historia monumento de la vivo de la homoj. Nun la loĝantaro ne nur de ĝi ne kuris, kiel de malsano kaj pesto, sed kun respekto kaj amo humile klinis teren siajn kapojn, rememorante la pereintajn savintojn de la lando.

Esperantigis Vaclavas Bartoŝeviĉius.

KORPA BELECO.

FREDERIKO KARINTHY.

EL "LITERATURA MONDO".

Je la dua tago post mia morto mi ricevis citeteron, ke mi aperu en la kontoro de la Transmonda Ĉiel-kompletiga Komandejo. Oni difinis mian lokon ie, kie kun pluraj aliaj ni atendis, ke oni transportu nin al la Marso, aŭ kien ajn en la kvara dimensio. Mi tre enuis. Je la kvina tago mi renkontis mian amikon Desiderion, por kiu la sama loko estis difinita.

— Kiel vi fartas, — mi demandis — ĉu vi longe restos ĉi tie?

— Mi ne scias. Mi tre enuas. Vi scias, oni malvigliĝas en la transmondo. Ne estas urĝaj aferoj, oni havas tempon por ĉio. La eterneco ja neniam elĉerpiĝas. Ĉu ankaŭ vin oni alcitis ĝis eternecfino?

— Jes. Ĉu ĉi tie estas ĉiam tiel enue?

— Jes kaj oni perdas la tutan bonhumoron. Ekzemple, antaŭhieraŭ venis en mian memoron, ke mi havas komision. Ankoraŭ antaŭ mia alcito mi promesis al iu, al sinjorino, ke je la dua tago post mia morto, nokte mi vizitos ŝin. Do, ĉi tio venis en mian memoron, mi pensis, ke mi havas ja nenion por fari, mi malsupreniros, ni interparolos iomete.

— Interese. Nu kaj kion ŝi diris?

— Kelkajn minutojn antaŭ noktmezo mi alvenis, la sinjorina moŝto ankoraŭ dormis. Mi pensis, ke ŝi dormu ja, mi iris tra la muro poste mi sidiĝis en la spegulon kaj mi rigardis ŝin. Laŭ multaj vidpunktoj preferinda estas ĉi tiu stato, ke oni ne havas korpon. La mia estis iom tro dika kaj mi ofte ŝvitis. Tio ne ekzistas ĉi tie.

— Kompreneble, vi estas prava.

— Do, mi estis sufiĉe scivola pri la renkonto. Nome mi skribis al ŝi longan kaj patosan leteron, en kiu mi promesis al ŝi ĉi tiun rendevuon. Mi skribis, ke ni renkontiĝos en la transa mondo.

Desiderio meditis.

— Nun mi ne komprenas, kial mi volis renkonti ŝin ĝuste en la transa mondo. Ŝajne mi havis ion gravan por diri al ŝi, sed, je Dio, mi forgesis ĝin. Mi sidis tie, en ŝia ĉambro, kaj rompis al mi la kapon, kion mi volis do diri al ŝi. Kvankam kiel urĝa estis por mi ĉi tiu renkontiĝo, mi mortpafis min nur por renkonti ŝin. Kaj pensu, mi estas tie, kaj nenio venas en mian kapon.

Denove li meditis.

— Ĉu bela virino? — mi demandis fine.

Desiderio ektiris la ŝultrojn.

— Dio nur scias! Antaŭe ŝi tre plaĉis al mi. Nun mi pririgardis ŝin pli bone, dum ŝi dormis. Diru sincere, ĉu dum via ĉi tiea restado ne venis en vian kapon, kia stranga afero estas la homa korpo?

— Ĉu stranga?

— Nu, jes. Mi povus diri: komika. Al mi faris strangan efikon tio, ke jen, ĉi tiuj homoj ĉiam ankoraŭ portas la korpon, kiun mi de longe jam ne portas. Ĉi tio estas ia.. ia.. emodiĝinta afero.. Kiel la vestoj eluzitaj de sinjoroj. La animo demetas la veston kaj ĉi tiuj plu portas ĝin...

— Kaŝas sin io en la afero. Sed la detaloj...

— Do, aŭskultu, ankaŭ tiujn mi pririgardis. Ekzemple, antaŭe mi estis freneze enamiĝinta al ŝiaj piedoj. Sed mi petas vin, eh, mi petas vin, kiel aspektas ja tia homa piedo. Ĝi estas evidente kvazaŭ kripliĝinta mano. Antaŭe ĝi ja estis mano, kiam la homo estis simio. La fingroj senformiĝis, la manplato fariĝis dika, senforma karnŝvelaĵo. Mi vere ne komprenas, ke tion mi antaŭe ne rimarkis.

— Kaj ŝia buŝo?

— Ĝi estas du ruĝaj karnkolbasoj. La supra aperturo de la intestsistemo, ŝveliĝinta pro la multa manĝo. Interne estas ostetoj, sed ankaŭ tiuj ne havas regulan formon. Poste la nazo...! Nu, aŭdu! ĉu povas ekzisti io pli senforma, ĝi havas du truojn. Sed plej komikaj, plej mizeraj estas la du oreloj. Ke ĉi tio neniam venis en mian kapon! Du malevoluintaj, plorindaj karnfranĝoj, kiuj ŝrumpis kaj kunfaldiĝis, kvazaŭ rostita lardo. Kaj du tiaj franĝoj pendas ĉe la du flankoj de la kapo, kaj ili plaĉis al mi! kaj mi volis kisi ilin! Brr!

— Strange, strange. Estas io prava en via parolo.

— Kaj mi rigardis ŝin iom da tempo. Same tia estas la tuta. Poste denove mi rompis al mi la kapon, kial mi volis renkonti ŝin. Poste, ĉu honte, ĉu

ne honte, mi ne povis rememori, do mi kaptis min, kaj bele, silente mi forportis min antaŭ ol ŝi vekiĝis.

— Mi ne reirus plu eĉ se oni promesus al mi... mi ne scias, kion.

— De tiam vi tute ne rememoris ŝin?

— Kion fari? Ne! Sed mi tute ne streĉas min, mi havas ja tempon. Por tio estas ja la eterneco. Ĉu vi ne havas cigaredon?

—Mi havas, sed kiel fumi, se mi ne havas buŝon?

— Vere. Vidu, jen la sola afero, kiun mi bedaŭras.

El La Legendoj De Malnova Egipto.

B. Prus. (A. Glowacki)

EL "LITERATURA MONDO"

Vidu, kiel vanaj estas la homaj esperoj kontraŭ la ordo de la mondo! vidu, kiel ili estas vanaj kontraŭ la verdiktoj, kiujn la Eternulo per fajraj signoj skribas sur la ĉielo!...

La centjara Ramzes, la potenca reganto de Tebo, mortadis. Sur la bruston de la potenculo, antaŭ kies voĉo dum jarkvindeko tremis milionoj, ekfalis sufokanta inkubo kaj suĉadis la sangon el lia koro, la forton el lia brako, kaj kelkfoje eĉ la konscion el lia cerbo. Kiel faligita cedro kuŝis la granda faraono sur felo de hinda tigro, kovrinte la piedojn per la triumfa vestaĵo de la reĝo de l' Etiopoj. Kaj severa eĉ al si mem, li vokis la plej saĝan kuraciston el la sanktejo en Karnak kaj diris:

— Mi scias, ke vi konas efikajn kuracilojn, kiuj aŭ mortigas aŭ tuj sanigas. Preparu por mi tian, konforman al mia malsano, sed ĝi jam fine ĉesu.. tiel aŭ alie.

La kuracisto hezitis.

— Pensu, Ramzes — li ekflustris — ke de la tempo de via malsupreniĝo el la alta ĉielo Nilo jam cent fojojn elbordiĝis; ĉu mi do povas doni al vi kuracilon, ne sendanĝeran eĉ por la plej juna el viaj militistoj?

Ramzes sidiĝis sur la lito.

— Certe mi estas tre malsana — li ekkriis — se vi, pastro, kuraĝas doni al mi konsilojn! Silentu kaj plenumu, kion mi ordonis. Ja vivas mia tridekjara nepo kaj sekvanto, Horus; kaj Egipto ne povas havi reganton, kiu ne povas eksidi la batalveturilon kaj levi ponardon.

Kiam la pastro per tremanta mano donis al li la kuracilon, Ramzes eltrinkis ĝin, kiel soifanto trinkas poteton da akvo; poste li vokis al si la plej faman astrologon el Tebo kaj ordonis sincere rakonti, kion montras la steloj.

— Saturno kuniĝis kun la Luno — respondis la saĝulo. — Tio antaŭdiras morton de ano de via dinastio, Ramzes. Vi faris malbone, trinkante hodiaŭ la kuracilon, ĉar vanaj estas la homaj planoj kontraŭ la verdiktoj, kiujn la Eternulo skribas sur la ĉielo.

— Kompreneble, ke la steloj antaŭdiris mian morton — rediris Ramzes. — Sed kiam tio ekestos? — li turnis sin al la kuracisto.

— Antaŭ la sun-leviĝo, Ramzes, aŭ vi estos sana, kiel rinocero, aŭ via sankta ringo troviĝos sur la mano de Horus.

— Enkonduku — diris Ramzes per jam mallaŭtiĝanta voĉo — Horuson en la aŭlon faraonan; li atendu tie je miaj lastaj vortoj kaj je la ringo, por ke ne estu interrompo en la regado.

Ekploris Horus (li havis koron plenan de kompato) pro la proksima morto de la avo; sed ĉar ne povis esti interrompo en la regado, li do ekiris en la aŭlon faraonan, ĉirkaŭate per multnombra aro da servistoj.

Li sidiĝis sur la balkonon, kies marmora ŝtuparo kondukis malsupren al la rivero, kaj plene de nedifinita malĝojo, li rigardis al la ĉirkaŭaĵo.

Ĝuste la luno, apud kiu bruletis la malbonsignifa stelo Saturno, orumis la bronzan akvon de Nilo, pentris la ombrojn de la grandegaj piramidoj sur herbejoj kaj ĝardenoj kaj lumigis la tutan valon kelke da mejloj ĉirkaŭe. Malgraŭ la malfrua nokto, en la kabanoj kaj domoj lumis lampoj, kaj la loĝantaro eliris el la konstruaĵoj, sub la ĉielon. Sur la Nilo svarmis boatoj dense kiel en tago festa; en la palmaj arbaroj, ĉe la bordoj de l'akvo, sur la placoj, en la stratoj kaj ĉe la palaco de Ramzes ondis sennombra homamaso. Sed malgraŭ tio, estis tia mallaŭto, ke al Horus alkuradis la brueto de akva kano kaj la ĝema hurlado de hienoj serĉantaj manĝaĵon.

— Kial ili amasiĝas? — demandis Horus korteganon, montrante la ne mezureblan aron da homaj kapoj.

— Ili volas saluti vin, sinjoro, kiel faraonon kaj aŭdi el via buŝo pri la bonfaroj, kiujn vi destinis por ili.

En ĉi tiu momento, la unuan fojon, la koron de l'princo ekfrapis fiero pro grandeco, kiel krutan bordon ekfrapas la alkuranta maro.

— Kaj kion signifas tiuj lumoj? — demandis plue Horus.

— La pastroj iris al la tombo de via patrino Zeforo, por transporti ŝian korpon al la faraonaj katakomboj.

En la koro de Horus denove vekiĝis doloro pro la patrino, kies korpon — pro la kompato, montrita al sklavoj — la severa Ramzes enterigis inter sklavoj.

— Mi aŭdas henadon de ĉevaloj — diris Horus, atente aŭskultante—kiu forveturas en tiu ĉi horo?

— La kanceliero, sinjoro, ordonis pretigi kurierojn pro via instruisto Jetron.

Horus ekĝemetis je rememoro de la amata amiko, kiun Ramzes ekzilis el la lando, ĉar li semis en la animon de la nepo kaj lia sekvantaro malamon je militoj kaj kompaton por la premata popolo.— Kaj tiu lumeto post la Nilo?...

— Per tiu lumo, ho Horus, — respondis la korteganо — salutas vin el la monaheja malliberejo la fidela Bereniko. Jam la ĉefpastro sendis por ŝi la faraonan boaton; kaj kiam la sankta ringo ekbrilos sur via mano, malfermiĝos la malpeza pordo monaheja kaj ŝi revenos al vi sopirante kaj amante.

Ekaŭdinte tiujn vortojn, Horus pri nenio jam demandis; li eksilentis kaj kovris la okulojn per la mano.

Subite li eksiblis pro doloro.

— Kio estas al vi, Horus?

— Abelo ekmordis mian piedon — respondis la paliĝinta princo.